

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Lu Wunsch-Rolshoven:
“Kreskigi Esperantujon”
SAT kaj TEJO kongresis
Konferenco de ILEI
Landaj kongresoj en
Italio kaj Usono
Denove en Krynica
La lasta FESTO antaŭ la
fino de la mondo
Kio estas Neciklopedio?
Jubileo de Lev Gumiljov
Tri novaj dokumentoj pri
Marko Zamenhof
Nia trezoro:
Baldur Ragnarsson
Rusa antologio:
Aleksej Pleŝĉejev



2012

10

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2012. №10 (216)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, ALEN KRIS, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Mojajev, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2013

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara *Ondo*.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2012.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2012, №10 (216).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 16 сентября 2012 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Vortoj de komitatano Z

Al pli azia estonteco de UEA

Raportoj pri la UK en Hanojo elstarigas la junecon de la loka esperantistaro. Ankaŭ tiu, kiu ne partoprenis la kongreson, povas konkludi tion el la fotoj, kiujn kongresanoj afiŝas en la reto. Estus interese vidi ankaŭ statistikojn pri la aĝostrukturo de tiu ĉi nekutima UK, sed verŝajne nur tre malmultaj UK-oj, se entute iu alia, estis organizitaj de tiel juna loka laborforto kiel tiu en Hanojo.

Al la kongresanoj el landoj kun laca, maljunula movado Hanojo devis esti esperiga sperto: almenaŭ en Vjetnamio kaj iuj aliaj aziaj landoj la Afero ŝajnas havi estontecon. En Vjetnamio ankaŭ la aŭtoritatoj ŝajne rilatas al Esperanto amike, ĉar ili disdonis ordenojn al pluraj esperantistoj kaj ankaŭ al Universala Esperanto-Asocio mem, kiu post pli ol duona jarcento en Roterdamo ankoraŭ atendas sian unuan nederlandan medalon.

Tamen, okcidentanoj ne nur pasive kovu esperon pri hela estonteco en Azio, sed ili, kaj kun ili UEA, flegu la tian movadon. La graveco de la aziaj tigroj rapide kreskas en la monda ekonomio kaj monda vivo ĝenerale, sed tio ne reflektiĝas en la diskuto pri la strategio de UEA nek en la konsisto de la diskutantoj. Al azianoj tiu diskuto verŝajne estas volapukaĵo kaj apenaŭ tuŝas tion, kiel ili perceptas sian esperantistecon kaj kion ili atendas de UEA. Ĉe iuj ĝi povas plifortigi la senton pri duarangeco, kiu sento jam estas forta pro la privilegia facileco de Esperanto por okcidentanoj.

UEA havis jam tri prezidantojn el Azio kaj po unu-du azianojn en kelkaj estraroj. Ili tamen ne lasis tre profundajn spurojn kaj ne sukcesis esence ŝanĝi la okcidentan orientiĝon de UEA. La vaste respektata Lee Chong-Yeong el Koreio eĉ pli verve fokusiĝis al EU ol liaj antaŭaj kaj postaj kolegoj. Se Azio ne ricevas apartan atenton en la strategio de UEA, aziano en la estraro apenaŭ povas esti pli ol dekoraĵo, krom se tiu estas aparte forta personeco.

Historiistoj iam pristudu, ĉu antaŭ 30 jaroj UEA faris saĝan strategian elekton, kiam ĝi decidis esperantigi Afrikon. Tiu celo eĉ relative sukcesis, ĉar en iama dezerto de Esperantujo aperis multaj verdaj oazoj. Ilia vivtenado tamen kostis multe da mono, kiu apenaŭ donis tiom da movada rento, kiom oni atendis. Feliĉe UEA reviziis sian afrikan agadon kaj nun celas per malpli da mono pli altan kvaliton de la movado anstataŭ pli granda kvanto. Se ne antaŭ 30 jaroj, ĉu nun estu la vico de Azio?

Bona evoluo estas, ke UK jam okazis kelkfoje en Azio. Multaj azianoj ricevis la ŝancon sperti sian esperantistecon en la plej vera maniero, en vid-al-vida kontakto kun alilandanoj. Tio en si mem estas ege valora. La laboraj diskutoj de UEA tamen ankaŭ en aziaj UK-oj ŝajnas esti samaj kiel en Eŭropo anstataŭ uzi la ŝancon ekscii rekte de azianoj, kion por ili povus signifi UEA.

Almenaŭ postkongrese la gvidantoj de UEA tenu varmaj la kontaktojn kun siaj novaj vjetnamaj konatoj, ĉar tio, kion ili pensas, gravas por la estonteco de UEA multe pli ol tio, kion oni legas en la retlistoj.

Komitatano Z

La junularo agas ne nur en Azio — vidu sur la kovropaĝo la prezidantinon de PEJ Dorota Rodzianko en la Esperantobudo dum la Forumo en Krynica. (Foto: Peter Baláž)

Kreskigi Esperantuojn

Kion ni faru tiucele uzante la scion de fakuloj pri varbado kaj merkatico? Jen la demando, kiun Lu Wunsch-Rolshoven (EsperantoLand) metis al si, kiam Sam Green, reĝisoro de la filmo *The Universal Language*, petis kontribuon por la retejo esperantodocumentary.com. Sekvas mallongigita versio de lia eseo.

Esperanto-varbado kaj -merkatico. Unu afero delonge mirigas min: La Esperanto-komunumo (aŭ pli precize la asocioj) asertas, ke oni deziras disvastigi la uzadon de Esperanto, sed en la praktiko la membronombroj stagnas aŭ malkreskas. Kial?

Unu el la kernaj kaŭzoj laŭ mi estas, ke en la Esperanto-asocioj apenaŭ estas fakuloj pri varbado kaj merkatico. Mi celas “libertempajn fakulojn”, homojn, kiuj legis kelkajn librojn pri tiuj fakoj, partoprenis semajnfinajn seminariojn kaj praktikas tion lige al Esperanto. La disvastigo de Esperanto, la kreskigo de la Esperanto-parolantaro, apenaŭ eblas sen baza scio pri varbado. Jen kelkaj faktoj el diversaj libroj kaj el la praktiko:

Varbado transportu la utilon, la allogon de la produkto. Do la surskribo “Esperanto” ne multe utilas kaj “Esperanto, la internacia lingvo” ja iom informas, sed ne jam logas. Kontraste sloganoj kiel “Amikoj en la tuta mondo — Esperanto, la internacia lingvo” aŭ “Vojaĝi al multaj landoj — Esperanto, la internacia lingvo” ligas pozitivajn ideojn kun Esperanto. Tia prezento de diversaj utiloj de Esperanto kreas allogon ĉe la celitaj homoj.

Varbado bezonas belecon. Plejparte estas la subkonscio, kiu igas nin agi; logas nin belaj aferoj kaj la atendo de plezuro. Se afiŝo estas bela, ĝi igas multajn homojn plu rigardi ĝin. Gravus la grafika aranĝo, eble bildoj de homoj kaj de vojaĝoj, naturo aŭ urboj.

Varbado bezonas ripetadon. Se informo pri Esperanto atingas homon dekfoje, oni havas proksimume la kvindekfojan probablon, ke tiu homo vere eklernos Esperanton, ol se la informo atingas tiun homon nur unufoje. Do ni uzas niajn tempon kaj monon multe pli efike. Sekve estas saĝe koncentri sin al malgranda celgrupo — lernantoj de unu gimnazio, studentoj de du/tri universitataj institutoj kaj la apuda studenta manĝejo.

Novaj aferoj atingas la publikon per unuopaj grupoj. Egale kiun novan aferon oni surmerkatis, preskaŭ certe en la unua fazo oni atingos nur ĉ. du procentojn de la entute eblaj klientoj, aser-

tas la teorio pri Disvastiĝo de Novaj Aferoj. Temas pri t. n. *pioniroj* (aŭ *novigantoj*), homoj malfermaj al novaj aferoj, ofte junaj homoj, altnivele edukitaj. Ili akceptas la novaĵon, ĉar ĝi estas interesa. Ni ne asertu, ke jam multaj homoj uzas — kontraste eblas elstarigi, ke estas nur malmultaj homoj, sed speco de elito, kiu jam uzas la novan aferon.

Nur post la pioniroj venas la “fruaj adoptantoj”, ofte opinigvidantoj en la socio. Sed ni ankoraŭ ne sukcesis elĉerpi la grupon de pioniroj: Ekzemple inter studentoj ofte nur ĉ. triono scias, kio estas Esperanto, kaj kutime nur tre supraĵe. Se ni sukcesos bone informi kaj privarbi lernantojn ekde 14 jaroj kaj studentojn, plej verŝajne ni sukcesos plumbligi la nombron de Esperanto-lernantoj kaj -parolantoj en tiuj grupoj.

La teorio de disvastiĝo de novaj aferoj helpas ankaŭ klarigi, kial la klopodoj disvastigi Esperanton ĉe politikistoj apenaŭ sukcesis kaj havas nur malgrandan probablon sukcesi: Politikistoj kutime ne estas pioniroj. Ili subtenas aferojn, kiujn multaj civitanoj deziras. Politika agado do verŝajne povos havi sukceson nur post la varbado de la pioniroj kaj la fruaj adoptantoj.

Necesas multa varbado. Ni kalkulu ekzemple kun 1000 studentoj, kiuj vizitadas universitatan instituton. Prefere ni ĉiun informu ĉ. dekfoje. Do ni devas krei 10.000 kontaktojn — rigardojn al afiŝo sur biciklo, al gluetikedo, al flug-

folio, al varba pulovero ktp. Ni havas ŝancon nur pri ĉ. 10 studentoj, kiuj eventuale lernos Esperanton en la nuna fazo de pioniroj. Multa laboro por ŝajne malgranda rezulto, sed ĝuste tio necesas. Kaj ni estu efikaj: Afiŝoj, gluetikedoj kaj T-ĉemizoj bezonas malpli da tempo ol disdonado de flugfolioj.

Indas kontroli la efikon de varbado. Tre utilas scii, kiom da homoj konas la nomon “Esperanto” antaŭ kaj post varbokampanjo kaj kiom ligas al Esperanto ideojn kiel “rapide lernebla lingvo” aŭ “kontaktoj en cent landoj”. Tiel oni pli bone komprenas la efikon de varbokampanjo ol per la nura rezulto laŭ nombro de kursanoj. Ne necesas fari tion tre science: Meti tri ĝis kvin demandojn al tridek homoj jam donas iom da bazo por prijuĝi; tia enketo fareblas ene de unu aŭ du horoj.


Necesas iom da mono. Malfacilas decidi kiom da mono necesas kaj estas pluraj metodoj por tio. Verŝajne elspezi 3-5% de la jara elspezo por informado kaj varbado ebligas iom da kresko, 10% supozeble kondukos al pli signifa kresko. Nuntempe multaj Esperanto-asocioj uzas nur ĉ. 1% de la jara elspezo por informado (kaj la membraroj malkreskas...).

Ne indas elspezi multan monon antaŭ ol oni scias, kiel fari tion. Eble dum pluraj jaroj oni dediĉu 5% de la jara buĝeto al rezervo por varbado kaj elspezu tiun ĉi monon nur post kiam edukiĝis Esperanto-varbfakuloj. Se vere neniu pretos studi pri varbado, oni povos post kelkaj jaroj remeti la monon al la ĝenerala kaso.

Libroj. Mi multe ĉerpis el du libroj de David Ogilvy, *Konfeso de varbisto* (ĉapitroj ekde *Kiel kreiĝas grandaj kampanjoj*) kaj *Ogilvy pri varbado* (ĉapitroj kiel *Varbado kiu vendas* kaj *Rekta varbado*). Pri malmultekosta varbado informas Jay Conrad Levinson en la diversaj libroj de la serio *Guerilla Marketing*. Pri “disvastiĝo de novaj aferoj” (Diffusion of Innovations) skribis Everett Rogers en sia iom longa, sed bone legebla libro; aplikis tiujn ideojn al la mondo de komputiloj Geoffrey A. Moore en *Crossing the Chasm* kaj *Inside the Tornado* — indas transformi la ideojn el la komputila mondo al nia Esperanto-temo.

La fakuloj pri varbado kaj merkatico certe ne agas plene laŭ la idealoj de la Esperanto-komunumo. Tamen ilia scio estas valorega por pli sukcese disvastigi nian lingvon kaj ĝiajn idealojn. Esperanto kaj Zamenhof meritas tion.

Lu Wunsch-Rolshoven
(EsperantoLand)





Kiam tradicio kaj moderna intertuŝiĝas: jen popmuzika kvarteto, kiu digne povus roli eĉ en plej prestiĝa televida spektaklo, ie ajn en la mondo.

Rekorda konferenco de ILEI

La solena malfermo de la 45a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estis sendube la plej impona en la Liga historio, kun la plej altrangaj akceptantoj iam ajn altiritaj. Podie sidis naŭ solenuloj, ses personoj alparolis la 300-kapan publikon. Eĉ kun dulingva prezentado, la ceremonio restis ĝis unuminuta precizeco ene de la antaŭvidita horo.

La unua preleganto estis la antaŭa vicestro de la provinco Junnano, Liang Gongqing, kiu jene priskribis la provincon: “Ĉi tie estas okulfrapaj belaj artoj de diversaj nacioj, buntaj popolaj bildoj de diversaj nacimalplimulto, kun brilo de longa historia kulturo”. Ĉeestis plie la nuna provinca vicestro.

Responde, la prezidanto de ILEI, Stefan MacGill, dankis al Liang Gongqing pro la bonvenigo kaj provinca apogo por la konferenco. Danko direktiĝis al Duan Yongxing, longtempa esperantisto kaj prezidanto de la gastiganta Profesia Artkolegio de Kunmingo, pro la materia kaj arta helpo de la kolegio. Li skizis la historion de ILEI-konferencoj — ĝis 2006 obstine eŭropaj kun nur tri esceptoj. Ekde 2007 okazis tutmondiga eksplodo, kulminanta en la Kunminga konferenco. La saluto venis al fino per observoj pri la konferenca temo.

La tria parolanto estis la prezidanto de la kolegio, kiu parolis en Esperanto kaj ricevis ĉinan tradukon. Li diris interalie: “Lingvo, kiel ilo de amasa komunikado, karakteriziĝas ofte per kunfandiĝo de pensoj kaj karamboloj de saĝofajreroj. Esperanto, kiel ponto inter lingvoj, dissemas ideojn de espero, paco, amikeco kaj amo”.

Nome de LKK parolis Gong Xiaofeng (Arko) kun bonvenigo al la partoprenantoj el 19 landoj. La landajn salutojn prezentis Bharat Kumar el Nepalo, reprezentante la aziajn sekciojn, kaj Aurora Bute el Rumanio, nome de la neaziaj. Antaŭ la malfermo, en akcepto por la alvenantaj ĉinaj gastoj, ni tuŝis la deziron de la provinco kaj kolegio vastigi siajn artajn kontaktojn pere de Esperanto al landoj, kie tiuj ĝis nun ne ekzistas. Tio inkluzivus reciprokajn studvizitojn aŭ liveron de artinstruistoj. Klare ĉi tie ekzistas malferma sinteno al Esperanto kaj de ĝiaj praktikaj ebloj.

Sekvis spir-haltige mirinda arta koncerto kun eroj el plej diversaj regionoj de Ĉinio. Aprezema publiko ĉeestis; plie al cento da konferencanoj aldoniĝis ducento da studentoj kaj instruistoj el la kolegio, por pleniĝi la halon.

La konferenco altiris 113 aliĝintojn, kun 104 surlokaj partoprenintoj. Do, temis grandmezure pri la plej granda ekstereŭropa ILEI-konferenco iam ajn, kaj la plej granda entute de la lastaj 26 jaroj (ekde kiam ni havas informojn). La

komitato akceptis du novajn honorajn membrojn, Li Shijun (Laulum) kaj Li Weilun, kiu prelegis kaj kursgvidis dum la konferenco.

La komitato de ILEI akceptis tri novajn sekciojn el Mongolio, Nepalo kaj Vjetnamio. La nova estraro de ILEI por la sekvaj tri jaroj rompis plurajn rekordojn. Rekorde granda (9 membroj pro la laboro-kresko), rekorde ina (5 el 9), rekorde renovigita (6 novuloj) kaj rekorde tutmonda (4 kontinentoj).

Fariĝis tradicio, ke ILEI kadre de sia konferenco starigas dialogon kun neesperantistaj universitatoj spertaj pri lingvoj kaj kulturoj. Tio realiĝis en tuttaga simpozio kun deko da prezentantoj, ĉiu prilumanta iun aspekton de la kongresa temo: “La arto de komunikado, komunikado de artoj”. La temo aparte aktualas en la provinco Junnano, kiu entenas loĝantojn kun ĉ. 25 etnaj grupoj, la plimulto kun apartaj lingvoj, alfabetoj, kutimoj kaj artformoj. Grandas la bezono por komunikado inter tiuj malplimultoj. La prelegoj okazis en la ĉina kaj Esperanto. Tradukoj estis montritaj ekrane por rapidigi progreson kaj permesi seninterrompan paroladon. Diskuto-tempo restis post ĉiu prelego. La 150-seĝa aŭditorio estis plena.

Lastatage okazis sukcesa Lingva Festivalo, en kiu estis prezentitaj 18 lingvoj, kio altiris ankaŭ studentojn el la kolegio. La impona ferma ceremonio prezentis ĉefe kantajn kaj dancajn erojn. Ĝi finiĝis per 25-kapa koruso, kiu kantis la himnon *La Espero* laŭ vigla interpreto; tio estis la komencpunkto por konferencfina koncerto. Ties finon markis adiaŭaj kantoj en Esperanto, dum kiuj videblis fone sur giganta ekrano cento da profesinivele faritaj fotoj el nia konferenca semajno. Kronis la vesperon piroteknika spektaklo.

Stefan MacGill

Rezolucio

La 45a Konferenco de ILEI, okazinta inter la 20a kaj 26a de julio 2012 en Kunmingo, Ĉinio, kun 113 aliĝintoj el 19 landoj:

- Deklaras sian entuziasman apogon al la nune diskutata Strategia Vizio de UEA; la Ligo kunlaboros en ĝia kompletigo en la formo de Strategia Plano.
- Apogas la vizian reliefigon de demokrata decidado en la Asocio, la klara elstarigo de ĉefaj agadkampoj kaj de la aktivigo de membroj kaj la landaj kaj fakaj asocioj.
- Subtenas la eneston de la grava principo de lingva justeco, kaj proponas enkadrigi ĝin en la ideon de tutmonda solidara socio.
- Bonvenigas aparte la specifecon de la vizio, kiu antaŭvidas konkretajn subcelojn, kiuj estu realigeblaj, mezureblaj kaj ambiciaj.
- Kaj laŭdas forte la planojn dediĉi pli el la asociaj rimedoj al progreso en la kernaj agadkampoj, inter kiuj klare troviĝas la edukado kaj instruado.

IJK-2012 denove en Vjetnamio

La ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso komenciĝis la 5an de aŭgusto, unu tagon post la fermo de la 97a Universala Kongreso en la sama urbo, Hanojo — ĉefurbo de Vjetnamio. La samlokiĝon kaŭzis neatendite deviga ŝanĝo de planoj pri IJK, kiu origine devis okazi en Japanio; la japanaj gejunuloj komence de la jaro informis al TEJO ke ili ne sukcesos organizi la kongreson, kaj sekve vjetnamoj kuraĝe transprenis la taskon, kaj ene de duonjaro brile sukcesis.

Venis al la kongreso 145 partoprenantoj el 27 landoj.

La oficiala malfermo de la kongreso okazis la matenon de 6a de aŭgusto. En la domo de Unuiĝo de Amikecaj Organizaĵoj, kun ĉeestantaj gravuloj kaj reprezentantoj de amaskomunikiloj, Nguyen Thi Phuong (Flama Floro, prezidantino de LKK) kaj Michael Boris Mandirola (vicprezidanto de TEJO) inaŭguris la 68an IJK-on. Sekvis la unua kunsido de la Komitato de TEJO, kiun momente vizitis la prezidanto de UEA Probal Dasgupta, salutinta la Komitaton nome de UEA. Posttagmeze okazis Lingva Festivalo, gvidita de Olga Ŝilajeva, kadre de kiu la kongresanoj povis partopreni prezentojn pri diversaj lingvoj kaj lingvajn fulm-kursojn. La pli malfrua hanoja surakva pupteatraĵo, tradicia vjetnama arto, altiris tiom da interesigantoj ke eĉ ne sufiĉis biletoj por ĉiuj.

La venontan matenon oni kune ekskursis al Maŭzoleo de Ho Chi Minh kaj al la Literatura Templo — la unua universitato de Vjetnamio. La ekskurso akompanis forta pluvo, tute kutima en Vjetnamio por tiu ĉi periodo de la jaro, sed sufiĉe surpriza por la eŭropanoj. Posttagmeze estis organizita aŭkcio, la celo de kiu estis kolekti monon por la apudhanoja orfejo “S.O.S.” — estis vendataj libroj, ĉapeletoj, memoraĵoj, ludoj, alkoholaĵoj kaj aliĝnumero 1 al la venontjara IJK; sume oni sukcesis kolekti pere de la aŭkcio pli ol 350 eŭrojn (preskaŭ 9,000,000 donoj). Tiuj estis transdonitaj al la orfejo la venontan tagon.

Antaŭ la komenciĝo de la vespera programo tiutaga Michael Boris Mandirola solene transdonis al Rafael Henrique Zebretto kaj Alvaro Motta diplomojn pri elstara agado — distingon aljuĝatan fare de la Estraro de UEA. Ili ricevis tiujn ĉi diplomojn pro la sindediĉa laboro por Esperanto antaŭ kaj kadre de la tutmonda pridaŭripova konferenco Rio+20 en Brazilo.



Inaŭguro de la 68a IJK en Hanojo: prezidanto de LKK Phuong Nguyen (en Esperanto: Flama Floro) kaj vicprezidanto de TEJO Michael Boris Mandirola. (Foto: Lê Minh Thu)

La sekva tago komenciĝis per vizito de la Etnologia Muzeo, prezentanta la historion de la nacioj kiuj loĝis kaj loĝas en Vjetnamio (nur en la nord-okcidenta regiono troviĝas 5 minoritatoj). Posttagmeze la Komitato de TEJO estis diskutanta la jaran raporton de 2011/2012 kaj la Estraran laborplanon por 2012/2013; dume la ceteraj partoprenantoj ĝuis tre interesan koncerton kun Vjetnamaj tradiciaj muzikiloj. Sekvis diversstaj prelegoj, kaj la tago estis konkludita en burĝa restoracio *Sen* (“lotuso” en la vjetnama), kiu ofertis nelimigitan elekton de manĝoj de diversaj tipoj kaj pluraj kuirartoj. Rizo, insektoj, viandaĵoj el strangaj korpopartoj, vegetaĵoj el strangaj plantoj, ĉiuj videblis sur la teleroj. La okupitajn per maĉado kongresanojn surprizis granda naskiĝtaga kuko — evidente, la Vjetnama Esperanto-Junulara Organizo havis jubileon! Post kantado de “Feliĉan naskiĝtagon!”, spontanee ekis kanto-batalo inter vjetnamoj kaj “cetero de la mondo”. Se tio ne sufiĉus, ĉirkaŭ la deserta tablo ariĝis granda rondo kaj oni ekdancis *La Bambon* rekte en la restoracio.

Tio ne malhelpis la jaŭdan matenon komenci eĉ antaŭ la 6a horo. Ĉiuj kongresanoj estis veturigitaj al Ba Vi — montara regiono okcidente de Hanojo. Tie, en leĝera etoso, okazis pluraj ludoj, konkursoj, dancadoj kaj noktaj babiladoj. La pluvego sekvis la IJK-n ankaŭ tien kaj meze de teama tasko-konkuro komplete ĉiujn malsekigis. Kombinante akvon kun akvo, la partoprenantoj ensaltis la naĝejon, kaj tie kunnaĝis *La Bambon* — verŝajne unika okazaĵo en la historio de IJK-oj.

Post la ripoza dua tago en Ba Vi, reveninte en Hanojon, oni spektis monologon pri la sendependeco de Brazilo, kiun sekvis prezento de tradicia brazila kampara geedziĝo kun ties gaja kampara danco Kvadrilo — ĝin partoprenis preskaŭ ĉiuj kongresanoj. La venonta mateno alportis kun si la solenan fermon de la 68a IJK kaj transdonon de la kongresa flago al Israelo — lando de la venontjara kongreso.

Estis anoncita la kongresa rezolucio, kiun aprobis pli antaŭe la komitatoj:

«La komitato de TEJO kunveninta en Hanojo, Vjetnamujo, kadre de la 68a Internacia Junulara Kongreso, ĝojas je la plenumo de valoroj kiel Amikeco, Frateco kaj Amo, kiuj estas bazaj valoroj por la Esperanto-movado kaj kiuj plene ĉefrolas en internaciaj Esperanto-renkontiĝoj.

La internacia junulara Esperanto-movado povas fieri pri tio, kaj ekzempli al la mondo pri sia internaci-komunumeco. Tio tamen ne estas nur celo en si mem, sed ankaŭ inspiro kaj motivo por junaj aktivuloj labori kaj kontribui al la disvastigo de Esperanto kiel interhoma komunikilo kaj solvo al internacikomunikaj problemoj.

En la junulara movado jam estas kutime labori kaj por evoluigo kaj fortigo de la Esperanto-komunumo kaj kulturo, samkiel por la disvastigo de la lingvo internacia, neŭtrale homa. Ni kredas ke la TEJO-agado povas esti pli komplete kaj amplekse difinita kiel raŭmisma finvenkismo».

Sergeo Gören, Pawel Fischer-Kotowski, Karina Maĝosa

La 79a kvazaŭitala kongreso

Se vi loĝas norde de Florenco, de la montaro Apeninoj ĝis la Norda Poluso, vi ne povas kompreni, kio estas Mazara-del-Valo. En la itala Mazara del Vallo, sed simple nomita de la kongresanoj: Mazaro. Temas pri urbeto ĉe la maro, fondita de fenicoj, gravigita de araboj, kiam ili konkeris Sicilion, kaj poste dum jarcentoj malbone administrita de hispanoj kaj italoj.

Ĝi estas urbeto ĉe la Meza Maro, pli simila al Kalamato en Grekujo ol al Bolonjo en Italujo. La homoj estas similaj al la turkoj de Anatolio, al la grekoj, al la urbaj araboj de Norda Afriko. La maro estas la sama. Pro la varmo la publika vivo komenciĝas vespere post la 8-a kaj daŭras ĝis la noktomezo.

Cetere en Mazaro mem vivas tre granda kaj integriĝinta komunumo de tunizianoj, kiuj transprenis la tradician ekonomian agadon, la fiŝkaptadon. “Integriĝinta” signifas, ke ĝi rajtas paroli la araban, havas siajn moskeojn, sed ankaŭ sendas siajn infanojn al la italaj lernejoj, lernis la lokan dialekton, ktp. Bela ekzemplo de multkultureco en la praktiko.

En tiu kunteksto inter la 18a kaj la 25a de aŭgusto okazis la 79a Itala Kongreso de Esperanto.

La ŝerca adjektivo en la titolo “kvazaŭitala” aludas al la fakto ke el la 34 partoprenintoj el 34 landoj pli ol du trionoj estis eksterlandanoj. La nombro 340, kiel decas en sudaj landoj, signifas “ne malpli ol”, ĉar ni ne scias la precizan

Gražina Opulskienė (la sesa de maldekstre) kun siaj kursanoj (Foto: Svetlana Smetanina)



nombro de la aliĝintoj (ni ne estas nord-eŭropanoj finfine).

La programo estis abundega. En unu tipa tago, la lundo, vi povis elekti ĉu viziti la ekspozicion pri Esperanto, kiu senmove restis je dispono de la civitanoj en la urbodomo, aŭ la libroservon, kiu senmove restis je dispono de la kongresanoj en la kongresejo. Vi povis partopreni la metodologian seminarion de Katalin Kováts pri lingvoinstruado aŭ la seminarion “Sed homoj kun homoj” de Kristin Tytĝat kaj Elisabeth Schwarzer. Temis pri malfacila elekto. Ambaŭ estis tiom seriozaj, kiom oni povas timi, kaj ambaŭ estis finance subtenataj de EU-instancoj.

Sed, se via intereso estis lingva, vi povis elekti inter la baza kurso pri Esperanto de Aida Ĉiĝikaitė, la progresiga kurso de Maria Butan kaj la superan kurson de Gražina Opulskienė. Sed, aliflanke, se vi estis neitalo kaj volis lerni la italan, jen por vi la kurso de Davide Astori.

Tio baze okazis ankaŭ en la posttagmezo, kiam aldoniĝis ankaŭ la kutimaj organizaj programeroj. En la lundo tiuj estis: asemblea kunveno de la Itala Instituto pri Esperanto, kunveno de la delegitoj de UEA, de la asocio ARCI, prelego pri la nova entrepreno Kosmo, kiu serĉas subvenciojn por esperantistaj asocioj. Al tio aldoniĝis kulturaj prelegoj, pri muziko de la grupo *Kajto*, pri la esperantistoj kiel nova etno de Aleksander Melnikov, kaj prezentado de libroj en Esperanto.

Sed ne estis paco ankaŭ en la vespero. Post la vespera spektaklo por la ne-esperantista publiko oni provis kapti vin per kulturaj prelegoj pri la Meza Maro kaj per alloga junulara vespera programo. Ne demandu min, kion ili faris. Mi scias nur ke en la mateno iuj vekigis kun la naĝkostumoj de iuj aliaj en ĉambro de ankoraŭ aliaj kongresanoj. “Ili estas junaj”, — oni diras ĉirkaŭ la Meza Maro.

Ne mirige, ke multaj, eble tro multaj kongresanoj, estis tiel timigitaj de tia abunda programo, ke ili decidis ekskursi la tutan tagon.

En Sicilio oni povas ekskursi dum ĉiuj sep tagoj de la kongreso, ĉar la ondoj de fenicoj, grekoj, romanoj, araboj, normandoj kaj hispanoj postlasis tiom da temploj, moskeoj kaj katedraloj, kiom turismema turistoj povas nur privi. Se italoj estus poloj, ili povus aranĝi tie tiom da turismo, kiom sufiĉus por bonfartigi la tutan landon, sed italoj kaj nuntempaj sicilianoj, kiel mi diris antaŭe, insiste misadministras Sicilion kaj revas pri helpoj el Bruselo.

Ĉiuokaze mi diru unu lastan aferon. Mi diris, ke la socia vivo okazas de la oka horo vespere ĝis noktomezo. Tiam familioj kun malgrandaj beboj kaj infanoj (mezmarano oni iĝas ne naskiĝas) promenas, aĉetas glaciaĵojn, esperas esti rigardataj de aliaj kaj rigardas aliajn. En ĉiu mezmara lingvo estas vorto aparta pri tiu speco de malrapida promenado (“dar vuelta” en la hispana). Kiam oni alvenas al la ĉefa placo oni rigardas la spektaklojn aranĝitajn de la urbestro dum la somero.

Nun okazis, ke dum la kongresa semajno, tiuj koncertoj estis en Esperanto. De Jomo al Kajto kaj al Kim, por mencii nur tri tre konataj. Tio kune kun la centoj da afiŝoj, kiujn la urbo afiŝis pri la kongreso, igis ĉiun mazaranon konscia pri la ekzisto de Esperanto.

“Se temas pri rozoj, ili certe floras”, — diras alia ĉi tiea proverbo, alivorte se iu devus fariĝi esperantisto, li certe post ĉi tiu anonckampanjo fariĝos esperantisto.

Mazaro estas por ni facila urbo, ĉar la urbestro estas konvinkita pri Esperanto, kaj revas fari el Mazaro specon de Herzberg, de Esperanto-urbo. Sed ni provas ankaŭ en similaj lokoj.

La venontan jaron venu al la kvazaŭitala kongreso en Kastelaro (Castellaro) apud Sanremo (San Remo) ĉe la lazura marbordo.

Renato Corsetti

Krynica denove kun Esperanto

Jam la 22a Ekonomia Forumo okazis ekde la 4a ĝis la 6a de septembro 2012 en la Pollanda kuracurbeto Krynica-Zdrój. Kaj ĉi-jare la sepan sinsekvan fojon ankaŭ Esperanto estis denove prezentita dum la Forumo.

Kunlaboro de pluraj Esperanto-organizoj ebligas la ĉeeston en tiu ĉi prestiĝa kaj grava evento. La Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), kiel la oficiala partnero, kutime starigas sian teamon de prelegantoj por la diskut-panelo. UEA kunfinancas la partoprenon de prelegantoj kaj same la Esperanto-standon. Pluraj volontuloj de PEJ (Pola Esperanto-Junularo) deĵoras en la Esperanto-budo por informi pri la lingvo, disdoni informilojn ktp.

La partopreno de Esperanto en la Forumo iĝis ebla danke al bona persona kontakto de Halina Komar kun la ĉeforganizantoj de la aranĝo kaj danke al ŝiaj helpemo kaj persistemo. Menciindas ke neniu alia civitana organizo tie havas sian budon, la Forumo estas kutime tre kosta por tiuj, kaj nur kelkaj grandegaj firmaoj prezentiĝas en kelkaj lokoj. Nur Esperanto ricevas daŭre senpage la eblon prezentiĝi.

Ĉi-jare la ĉefa temo de la Ekonomia Forumo estis: “Novaj vizioj por malfacilaj tempoj: Eŭropo kaj la mondo, konfrontantaj la krizon”.

Dum la Forumo okazas kutime pli ol ducento da prelegoj kaj diskutoj, ofte eĉ dek samtempe.

Partoprenis ĉ. 2 mil 500 personoj el la tuta mondo; ĉefe el Eŭropo kaj Azio, sed ankaŭ el Usono, Kanado k. a. Pluraj prezidentoj, ministroj, politikistoj, bankistoj, ekonomikistoj kaj amaso da ĵurnalistoj partoprenis la kunvenojn.

Eŭropa Esperanto-Unio proponis panel-diskuton kun la temo: “Kulturo: ĉu ankaŭ eŭropa, aŭ nur nacia?” Jozef Reinvart, Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor prezentis plurajn fenomenojn, rilatajn al la temo — ĉiam tuŝante ankaŭ Esperanton (de diversaj vidpunktoj).

Ĉi-jara partopreno kaj prezento de Esperanto en la Ekonomia Forumo estis sukcesaj: la panel-diskuto, disdonado de informiloj, kvizo pri Esperanto kun premioj, kaj tre bone videbla, sesmetra Esperanto-stando videbligis nian lingvon ekde la komenco ĝis la fino.

Hejmpaĝo de la Forumo:

<http://www.forum-ekonomiczne.pl/>

Peter Baláž
EEU-estrarano



Esperanto estis la sola civitana movado prezentita ĉi-jare en Krynica (Foto: Peter Baláž)

Szczawno Zdrój: Duobla jubileo

Szczawno Zdrój, kiu ĉi-jare jam la kvinan fojon gastigis partoprenantojn de la Internacia Esperantista Feriado, organizita de Silezia Esperanto Asocio, festis ekde la 5a ĝis la 12a de aŭgusto gravan esperantistan jubileon.

Junie antaŭ 100 jaroj en la tiam germana kuracloko Bad Salzbrunn kuracis sin la kreinto de la Lingvo Internacia. Do la plej grava parto de ĉi-jara Feriado estis solena malkovro de memortabulo sur la domo, kie li tiam loĝis. Partoprenis la nuna posedantino de la vilao — Iwona Bucka, multaj esperantistoj kaj loĝantoj de la kuracloko. La urbestro de Szczawno Zdrój, Tadeusz Wlazlak, esprimis akcepton de diversaj esperantistaj iniciatoj kaj ĝojon, ke la urbo fariĝas pli kaj pli alloga por esperantistoj.

Dank' al apogo de la urbodomo kaj afableco de aliaj lokaj estroj, esperantistoj havis preskaŭ ĉie malfermitajn pordojn kaj povis uzi por siaj okupoj la plej belajn “salonojn” en la urbo.

La 67 feriantoj, kiuj alvenis el naŭ eŭropaj landoj, pasigis interesan semajnon. La feria tagordo enhavis ĉiutage riĉan programon. Ses diversnivelaĵajn lingve grupojn gvidis sperta instruanto: Volodymir Pacjurko el Ukrainio, Konstantin Tiĥomirov el Ruslando, Bernhard Schwaiger el Aŭstrio kaj ĉarmaj polinoj: Teresa Nemere, Halina Ziółkowska-Fiala kaj Małgosia Komarnicka. Tiu lasta brile prezentis Esperanton kaj ties kulturon dum ciklo de prelegoj en la pola lingvo por ĉiuj interesiĝantoj. Ĉiutage oni povis spekti interesajn filmojn de Roman Dobrzyński, riĉigitajn per liaj rakontoj.

Tiu eduka kaj lerniga parto de la feriado ne malhelpis al riĉa turisma programo. Antaŭtagmeze oni multe ekskursis (buse, piede kaj trajne) vizitante la plej belajn montarajn itinerojn de Góry Wałbrzyskie kaj aliajn lokajn vizitindaĵojn: ekzemple, la trian laŭ la grandeco Pollandan kastelon Książ, palmejon en Lubiechów kun interesaj kreskaĵoj kaj agrabla kafejeto, la parkon de miniaturoj en Kowary “Malsupra Silezio en piloto” — loko, kie troviĝas belege cizelitaj la plej gravaj antikvaj konstruaĵoj de la regiono. Per trajno ni travojaĝis la plej belan parton de la trako laŭ la valo de la rivero Bóbr kaj admiris ĝiajn ĉarmajn panoramojn.

Gaja etoso regis dum vespera amuziĝado — ni multe kantis kaj dancis, promenis kaj babilis profitante eblecojn de ĉarma kuracloko. La jubileon honoris du grandiozaj koncertoj — de JoMo kaj Emanuel Rovere, kiuj por neesperantista spektantaro estis revelacio de nekonata kulturo kaj fariĝis la plej bona promocio de Esperanto.

Ŝajnas, ke kun granda ĝojo la urbestro de Szczawno Zdrój akceptis gratulojn de esperantistoj (i. a. el Herzberg kaj Lublin) pro la okazigo de jubileo kaj malkovro de memortabulo.

Ni esperas, ke tiu ĉarma kuracloko, signita per ĉeesto de nia Majstro — kun multaj parkoj, kuracaj akvoj, ĉarmaj kafejoj kaj... (plej grave) — gastamaj homoj fariĝos por multaj esperantistoj loko, kiun nepre oni devas viziti.

La plej proksima ebleco estos la venontjara (jam la 46a) IEF kaj JES 2013/14.

Ni kore invitas.

Teresa Pomorska

AIS sesiis en Varsovio

La 3an de septembro, je la nacia festotago de San-Marino, la 33a San-marineca Universitata Sesio estis malfermita de la rektoro de Warszawska Szkoła Zarządzania — Szkoła Wyższa (WSZ-SW; Varsovia Lernejo de Direktorado — Altlernejo), prof. dr. hab. Andrzej Zawislak, kaj la prezidanto de AIS San-Marino, OProf. Hans Michael Maitzen. La gastiganta instituto esprimis sian intencon apliki la internacian lingvon Esperanto por kontaktoj al siaj alilandaj partneraj institucioj kaj alstrebi stud-kursaron kun kursoj en Esperanto. La SUSejo, pretere, antaŭ la Dua Mondmilito estis sidejo de la Ligo de Nacioj en Varsovio.

Salutojn okaze de la inaŭguro transdonis reprezentantoj de UEA, ILEI kaj Silezia Esperanto-Asocio. Por la gastoj nesciantaj Esperanton okazis interpretado en la polan. Du pollandaj esperantistaj sciencistoj prelegis por la ekstera publiko pri aspektoj de la interlingva komunikado kaj la mondaj lingvaj problemoj: prof. dr. hab. Ilona Koutny prelegis en la internacia lingvo Esperanto kaj projekcie montris tekstojn en la pola; prof. dr. hab. Walter Żelazny prelegis en ambaŭ lingvoj.

La scienca programo de la sesio konsistis el kursoj pri interlingvistiko, scienca etiko kaj galaksia astronomio, ĉiuj je post-abiturienta nivelo por ebligi la partoprenon de alifakanoj. En liberaj prelegoj kelkaj AIS-anoj raportis pri sia scienca laboro aŭ pri aktualaj sciencaj temoj. Dr. Werner Fuß prelegis pri la demando, kial vivuloj enhavas certajn molekulojn nur en unu el du simetriaj formoj, kaj kalkulis la probablojn de diversaj eblaj klarigoj.

Paralele al tiu scienca programo la AIS-senato intertraktis kun la estraro de WSZ-SW pri kunlaboro kaj ellaboris intencdeklaron, kiu estu bazo ne nur de la planado, sed ankaŭ de eblaj subvencioj pri komunaj projektoj. La deklaron subskribis reprezentantoj de la du partneroj kaj krome oficialuloj de la asocio WSZ-SW antaŭ la Dua Mondmilito estis sidejo de la Ligo de Nacioj en Varsovio



TNOiK (Scienca Societo pri Organizado kaj Direktado), kiu kunordigos la kunlaboron. Unua paŝo estu instigi alilandajn partnerojn de WSZ-SW al la lernado de Esperanto por uzi tiun lingvon en faka kaj organiza kunlaboro.

Kadre de la sesio okazis studfina ekzameno sur magistra nivelo. Małgorzata Komarnicka, kiu ankaŭ elstare engaĝiĝis en la organizado de SUS 33, defendis sian disertaĵon, kiu komparas diversajn aspektojn de la traktado de la nocio “feliĉo” en psikologio, filozofio kaj arto. Rekone de ŝia laboro AIS alvokis ŝin kiel adjunkton sciencan (ASci) al sia Scienca Sektoro. AIS alvokis dum SUS 33 ankaŭ du novajn profesorojn kaj unu plenrajtan docenton.

SUS 33 estis ne granda, jam pro la mallonga prepartempo. Oficiale aliĝis 15 AIS-anoj, el kiuj unu ne povis alveni pro vizaj problemoj, kvankam WSZ-SW sendis profesie verkitan invitleteron. Krom tiuj AIS-anoj ĉeestis proksimume la sama nombro da lokanoj (anoj de WSZ-SW kaj aliaj interesuloj, precipe esperantistoj), de kiuj AIS ne postulis oficialan aliĝon.

WSZ-SW estis ĝis nun la tehniko plej bone ekipita SUS-ejo. Eĉ kiam la AIS-prezidanto OProf. Maitzen, kiu kiel astronomo preferas fingran kontakton al siaj prezentaĵoj, petis pri tablokamero por la projekciilo, tio ne estis problemo. Krome konvenis la eblo manĝi en la altlernejo kaj tiel ŝpari tempon dum la tagmeza paŭzo.

AIS konsideras SUS 33 sia modesta kontribuo al la 125-jariĝo de Esperanto, ĉar ĝi okazis en la urbo, kie aperis ties *Unua Libro*. En vespera programo lokaj esperantistoj montris al la SUS-anoj la varsovian Zamenhof-straton kaj la lokon de la domo de Zamenhof. Varsoviaj esperantistoj ankaŭ afable kontribuis per interpretado dum la sesio.

Ankoraŭ ne okazis decido pri loko kaj tempo de la sekva AIS-sesio. AIS certe konsideros reveni al Varsovio kaj WSZ-SW.

Reinhard Försmeier
senata sekretario de AIS

Eŭropa Komisiono financas

La nova Comenius-projekto **Vizito de la loka kastelo al la Eŭropa Domo** ricevis aprobon. Ĝi daŭros dum du jaroj inter mezlernejoj en la Esperanto-urbo Herzberg en Germanio, Győr en Hungario kaj Mazaradelvalo en Italio. Kiel kvara partnero povos aldoniĝi lernejo el Zagreb, kiu estas nun en atendolisto.

La projekton formulis Zsófia Kóródy kaj Ewa Kukielka el Herzberg, kiuj utiligis la spertojn el la antaŭa sukcesa projekto dum 2008–2010.

En la projekto **La diversaj profesioj — transformi la provokojn en eblecon realigi siajn revojn** partoprenos lernejoj de Bulgario (lernejo Canko Cerkovski), Rumanio (liceo Ana Ipătescu), Germanio (Gimnasium Winterberg und Medebach), Litovio (Mažeikių Merkelio Račkausko gimnazija), Svedio (Lerums Gimnasium) kaj Italio (Istituto statale di istruzione secondaria superiore della piana di Lucca ITCG Benedetti LS Majorana).

Oni organizos kvar laborrenkontiĝojn: en Bulgario (oktobro 2012), Italio (majo 2013), Germanio (oktobro 2013) kaj Rumanio (majo 2014). La partopreno en la projekto donos al la gejunuloj la eblecon orientiĝi kaj diagnozi la interesojn de siaj personecoj, pritaksi siajn eblecojn kaj kompreni la motivojn por la elekto de siaj profesioj. Dum la realigo de la projekto la gejunuloj havos eblecon renkontiĝi kun samaĝuloj de aliaj EU-landoj. Ili konatiĝos kun iliaj lingvoj kaj kulturoj, komprenos la neceson gardi la lingvan diversecon en Eŭropo kaj ricevos sciojn rilate al la edukaj, profesiaj kaj ekonomiaj eblecoj proponataj de la Unuiĝinta Eŭropo.

Oni atingos tion per uzado de interaktivaj metodoj kaj per uzado de Esperanto, kiu donos egalajn eblecojn de komunikado al ĉiuj partoprenantaj gejunuloj kaj al iliaj gvidantoj.

Itala Esperanto-Federacio kaj Kosmo Strategio Ltd. ĝoje anoncas ke Eŭropa Unio subtenos plian Esperanto-instruiston en Mazara del Vallo, danke al la programo **Grundtvig Vizitoj kaj Interŝanĝoj**. Esperantisto el Francio ricevos stipendion por translokiĝi al Mazara kaj kunlabori kun la tieaj agadoj de IEF dum kvin semajnoj. Grava sukceso, kiu aldoniĝas al la financado de esperantisto el Belgio por instrui dum tri monatoj. La rilatoj inter Esperanto kaj Mazara del Vallo pli kaj pli intensiĝas.

Laŭ *Eŭropa Bulteno*

SAT en (ne tro) suna Jalto

La 85a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazis en Jalto (Krimeo, Ukrainio) la 11–18an de aŭgusto kun la ĉeftemo *Kontraŭdiro inter kresko de naciismo kaj tutmondigo*.

Por loĝantoj de la eksa Sovetunio la vorto “Krimeo” elvokas pozitivajn emociojn, memorigante pri la suno, karesa maro, ekzotika por nordanoj mediteranea naturo... Tial ĝi vekis intereson de pluraj ukrainianoj, rusianoj, kazaĥianoj.

Sed por homoj ekster tiu mondregiono Jalto, pro iom komplika atingebleco, ne fariĝis, bedaŭrinde, tiom alloga, kaj da ili venis relative malmulte. Rezulte, do, estis nur iom pli ol 60 partoprenintoj: el Hispanio 3, el Francio 18, el Germanio 1, el Bulgario 1, el Kazaĥio 4, la ceteraj el Rusio kaj Ukrainio.

Tamen la kongreso, malgraŭ kelkaj organizaj misoj (ne estis antaŭpreparita eksterlabora programo, kaj ĉio okazis nekutime improvize, kvankam finfine ja okazis...), pasis sukcese. Malmultekosta kaj bona loĝado kaj manĝado en tuja proksimeco al la kongresejo moligis ĉiujn ceterajn misojn. Plej gravas, ke la viglaj kaj aferemaj laborkunsidoj montris grandan allogon ne nur por membroj, sed ankaŭ por la gastoj, kiuj, spertinte la kamaradecan etoson de SAT, volonte aliĝadis dum la kongreso al la asocio. Laŭ la rezulto de la diskutoj estis akceptita la Deklaracio kaj difinitaj la taskoj por la laboro de la asocio. El la laboroj de la SAT-frakcioj indas mencii tiun de la pacista, delonge la plej aktiva. Cetere, pro la graveco de tiuj laboroj al praktike ĉiuj SAT-membroj, ĝi dum la Kongreso transformiĝis je Pacista fako.

Ankaŭ eksterlaboraj programeroj estis diversaj kaj interesaj: koncerto de Paŭlo Moĵajev, prelego pri Lingvaj Festivaloj de Irina Gonĉarova, prezento de malgrandaj teatraĵoj laŭ rakontoj de Ĉeĥov fare de la Jalta Esperanta teatra grupo (kiun gvidas la ĉeforganizinto de la Kongreso Jefim Zajdman), okazinta en la korto de la domo-muzeo de la verkisto, k. a. Dum la Kongreso kaj la postkongresa periodo estis variaj ekskursoj al caraj palacoj en Livadio (kie en 1945 okazis Konferenco de la “Granda triopo”) kaj Masandro, urbo-heroo Sebastopolo kaj aliaj interesege lokoj, ligitaj kun fora kaj proksima historio kaj riĉa naturo, kio multe riĉigis la spiriton de la partoprenintoj. La maro estis varma, sed la vetero ne varmega — estis eĉ kelkaj pluvegoj — kaj tio multe kontribuis al la bona humoro de la kongresanoj.



Ĉe la Ĉeĥova domo (Foto: Irina Gonĉarova)

Pro bonaj impresoj pri la etoso de la Kongreso, pluraj partoprenintoj jam aliĝis al la sekva, 86a Kongreso de SAT, kiu okazos en aŭgusto 2013 en Madrido.

Nikolao Gudskov

Somero en la Esperanto-kastelo

La Esperanto-kastelo Grésillon organizis kvar semajnojn dum ĉi tiu somero, same kiel en 2011, kaj la nombro de partoprenantoj iomete kreskis.

— **Art-amatora semajno** kun intensaj Esperanto-kursoj inter la 21a kaj la 28a de julio;

— **Alternativa semajno** kun verd-politika seminario kun vegetaraj menuoj inter la 28a de julio kaj la 4a de aŭgusto;

— **Turisma semajno** inter la 4a kaj la 11a de aŭgusto kun ses posttagmezaj ekskursoj al turisma ĉirkaŭaĵo kaj kurso pri franca lingvo por alilingvanoj.

Fine inter la 11a kaj la 20a de aŭgusto en la Esperanto-kastelo okazis

Pupteatra festivaletto dank’ al Christof Frank kun partopreno de tutaj familioj, infanoj, junuloj. La nepalano Razen estis nia komuna gasto kune kun Pluezekaj Renkontoj. Kompreneble okazis krome en ĉiu semajno kursoj pri Esperanto, aktivaĵoj kiel Tajĝiĉuano, kanto, teatro, bindado...

Bedaŭrinde, ni ne sukcesis luigi la kastelon dum la aliaj someraj semajnoj krom por la somera universitato de EDE, kvankam la societanoj aprobis en marto 2012 la novajn statutojn kiuj permesas pli facilan uzon de la lokoj por neesperantistoj.

Ni esperas, ke niaj klopodoj por disvastigi la anoncon de luado de la kastelo al diversaj grupoj havos baldaŭnan sukceson.

Ni programis aldonan semajnon en 2012, nome **Aŭtune 2012**. Vidu nian TTT-ejon <http://gresillon.org>. Nia jarfina renkonto okazos de la 28a de decembro ĝis la 2a de januaro.

Jannick Huet

DEKLARACIO

La 85a SAT-Kongreso okazinta en Jalto (Ukrainio) de la 11a ĝis la 18a de aŭgusto 2012,

— Insistas ĉe la registaroj de Ĉinio, Hindio, Pakistano, Israelo, Rusio kaj Usono por ke ili subsribu kaj ratifu la konvencion de Otavo, kiu malpermesas ĉiujn kontraŭpersonajn minojn, kaj la konvencion de Oslo kiu malpermesas iujn pafaĵojetojn el bomboj,

— Petas de Ukrainia Prezidento, kiu subskribis kaj ratifis konvencion de Otavo, ke ĝi rapide detruu sian stokon je preskaŭ 6 milionoj da kontraŭpersonaj minoj,

— Petas liberigon de ĉiuj politikaj malliberigitaj kaj aparte kontraŭas subpremado al politika liberesprimo en la mondo,

— Esprimas siajn kontenton pri la politika konsciiĝo leviganta en la tuta mondo, kaj subtenon kaj kunsenton al la homoj suferantaj pro la politika kaj ekonomia subpremoj,

— Esprimas sian solidarecon kaj emfazas sian pluan kunlaboron kun nuntempe disvolviĝantaj sociaj movadoj — aparte salutas agadon de sociaj aktivuloj agantaj en Rusio kaj Kazaĥio, kiel estis raportite ĉi-kongrese al ni,

— Esprimas sian indignon pri la abomene maljustaj politikoj aplikataj de registaroj tra la mondo kaj pri la kruela subpremo de pacemaj protestantoj — aparte en Kazaĥio, kie dekoj da strikintoj estis mortigitaj kaj centoj reprezaliitaj.



Kongreso en Serbio

De la 31a de aŭgusto ĝis la 2a de septembro en Beogrado okazis la 5a kongreso de serbiaj esperantistoj. Partoprenis nur kvardeko da esperantistoj el Serbio kaj unu samideano el Bruselo.

La ĉefa temo de la kongreso estis centjariĝo de naskiĝo de Tibor Sekelj. Diversajn referaĵojn pri liaj vivo kaj agado por Esperanto verkis ĉefe membroj de novfondita Esperanto-societo *Nova sento*. Ĉiuj referaĵoj estas publikigitaj en la kongresa numero de *Beograda Verda Stelo*.

Ekster la traktado de la ĉefa temo, oni iniciatis refondon de la Serbia Esperanto-Ligo, kiu ne sukcesis reregistriĝi laŭ la nova leĝo, kaj jam pli ol unu jaron ĝi leĝe ne ekzistas. Oni elektis la estontan ("estontan", ĉar la ligo ankoraŭ ne estas registrita) estraron de SEL.

Krom priparolado de tiuj seriozaj aferoj oni ĝuis persipan trarigardon de Beogrado kaj du komunajn vespermanĝojn. Oni povas konstati, ke, malgraŭ la malmultnombra partoprenantaro, la kongreso tute sukcesis.

Adem Jakupović

SER-11: Bonega evento

"Bonega evento" — estis la opinio de la plimulto inter la 60 ĉeestantoj de la 11a Spiritista Esperantista Renkontiĝo, okazinta la 9an de septembro en Rio-de-Ĵanejro.

Alvaro Motta dum unu horo parolis pri la ĉefa temo "140 jaroj de la naskiĝo de Francisco Waldomiro Lorenz", kaj poste dum dudek minutoj respondis demandojn de ĉeestantoj pri la temo.

La violonisto Luiz Carlos Barbieri komencis la artan programon per kelkaj klasikaĵoj kaj popola muziko. Kvin gelernantoj de la Esperanto-Grupo "Lazaro Luiz Zamenhof" deklamis du lingve la poemon *Esperanto* de Castro Alves per la medio de Francisco Candido Xavier. Gelernantoj de EG "Lazaro Luiz Zamenhof", Margareth kaj Benedito, prezentis la skeĉon *Li rezignis* de Bertram Potts. Kvin lernantinoj de EG "Claude Piron" en du lingvoj kantis la kanton *Avina Rep'* (Rap da vovó) de Allan Argolo.

Dum la tuta evento Paulo Carvalho diskonigis "pilolajn" informojn *Ĉu vi scias?* pri la enlanda kaj eksterlanda movado. Fine ĉiuj kunkantis la himnon *La Espero* kaj pozis por la oficiala fotoĵo de la renkontiĝo.

Paulo Carvalho

Esperanto-USA: Ĉu UK en Usono?

La kongreso de Esperanto-USA okazis inter la 22a kaj la 25a de junio ĉe la Universitato de Teksaso en Dalaso kun 60 partoprenantoj el kvin landoj: Usono, Pakistano, Germanio, Hispanio, Ĉinio.

La temo de la kongreso estis *Estonteni*. Estis diskutoj pri kiel iri estonten. Inter la proponoj estas manieroj allogi novajn membrojn. Ni scias, ke estas multaj personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto, sed ne partoprenas en lokaj aŭ landaj Esperantaj aferoj. La landa asocio Esperanto-USA ankaŭ esploras la ideon okazigi Universalan Kongreson en Usono. Kelkaj kredas ke estas gravaj registaraj problemoj kun tio ĉi. Aliaj ne kredas tiel. Ni devas esplori tion ĉi kaj aliajn aferojn por fari decidon.

Estis kvin specoj de sesioj ĉe la EUSA LK2012: aferkunsidoj de Esperanto-USA, diskutoj de lingvaj aferoj, diskutoj de sciencaj aferoj, serio de filmoj, kaj distrado. La distrado okazis dufoje: vendrede kun Teksasa barbekuo (fajrorostaĵo) kaj barbareja muziko, kaj sabate kun la muziko de Karolina Brandon kaj la Bontempa Bando, kantoj de

Rhanda Hasley, Jarlo Bills, kaj Filipino Dorcas, kaj belaj amar-dolĉaj flutaj kaj gitaraj kantoj de Birke Dockhorn kaj Bertilo Wennergren. Dimanĉe estis eleganta bankedo, kie Bertilo Wennergren parolis pri "De la *Unua Libro* ĝis hiperteksto kaj datumbazoj".

Fred Meyer III

Historia standardo transdonita

La 25an de julio 2012 en pluva mateno ĉe la tombejo Mai Dich de Hanojo, Hideo Kumaki, nome de la Japana Pacdefenda Esperantista Asocio, transdonis al Le Thien Thu, komitatanino de la Vjetnama Esperanto-Asocio, la verdan flagon kun la slogano "Tuj retiriĝu usonaj agresantoj el Vjetnamio! Usono serioze observu la Ĝenevajn Interkonsentojn de 1954" kaj kun la subskriboj de la ĉeestintoj en la MEM-kunsido, okazinta en la 50a UK en Tokio en 1965.

Antaŭ la tombo de la kunfondinto kaj eksprezidanto de la Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio, Nguyen Van Kinh, sinjoro Kumaki raportis la aferon de la flago kaj donacis ĝin al VEA.

Le Thien Thu



SET: Tendaro kun longa historio

En la printempa jarkunveno de la Esperanto klubo en Třebíč (Ĉeĥio) estis elektitaj en la komitato junaj membroj, kiuj gvidas junularan grupon zorgantan nun pri la tradicia Somera Esperanto-Tendaro en Lančov.

La ĉi-jaraj tri etapoj jam okazis sub ilia reĝisorado kun helpo de Věra Podhradská. Antaŭ la tendaro ili en brigadoj blankigis kaj riparitis ĉiujn kabanon kaj la manĝejon, kreis tute novan modernan aspekton de la tendara retejo www.set-lancov.cz.

En la tri etapoj de SET sume partoprenis pli ol okdek infanoj kaj gejunuloj, precipe en la kursoj de la angla, sed nur kvin partoprenantoj de la du etapoj lernis en la Esperanto-kurso. Ĉiuj kursanoj sukcese pasigis ekzamenojn kaj ricevis diplomojn. Krom la instruado estis por ili preparata programo, ekskursoj, ludoj, naĝado ktp.

La du najbaraj tendaroj (Svitavy kaj Znojmo) nuligis la trian etapon pro la manko de infanoj, sed nia tria etapo estis male la plej forta.

Post la tria etapo okazis jam la 15a renkontiĝo de iamaj tendaranoj kun tri-deko da partoprenantoj. Dum la sabata solena viciĝo Pavel Sittauer rakontis la historion de la tendaro, prezentis s-rojn Jaro Habeš kaj František Sklenář kaj sian edzinon, Olga Sittauerová (tiam ankoraŭ fraŭlino Hruběšová), ĉar ili kvar en 1950 komencis organizi tendarojn. Ĉeestis ankaŭ akademia pentristo Josef Kremláček, kiu antaŭ sesdek jaroj ankoraŭ kiel knabo pentris tendaran totemon kaj sur tendo grandan kapon de indiano, kiu ege “plaĉis” al la ŝtata polico.

Fine li esprimis esperon, ke la junaj gvidantoj daŭrigos la laboron pluajn 60 jarojn. La partoprenantoj de la renkonto esprimis al la gejunuloj, kiuj transprenis la imaginaran stafeton, plenan subtenon kun deziro, ke la tendaro plu prosperu kaj estu alloga.

Posttagmeze la partoprenantoj vizitis la elektrocentron en Vranov, kie juna ĉiĉerono montris al ili Francis-turbinojn kaj aliajn ekipaĵojn. Dekminuta instrua filmo klarigis historion de la digolago kaj de la elektrejo.

Vespere ĉiuj kolektiĝis ĉirkaŭ la tendara fajro por komune kanti ĉe gitaro kantojn Esperante kaj ĉeĥe kaj gustumi vinon kun manĝetoj.

Miroslav Malovec
Věra Podhradská

Burundo: Instruisto por ĉiu lernejo

Ekde la 24a ĝis la 30a de aŭgusto en la burunda urbo Rumonge okazis studseminario “Instruisto por ĉiu lernejo” kun la celo formi instruistojn, kiuj post diplomiĝo starigu klubojn en lernejoj, kie ili lernas aŭ instruas.

Malfermante la seminarion, la prezidanto de la landa Esperanto-Asocio ANEB, Jeremie Sabiyumva, bonvenigis la partoprenintojn, prezentis la programon kaj petis aktive partopreni kaj atente sekvi instruistojn.

ANEB invitis 40 gelernantojn, 5 instruistojn (kun la meza nivelo de la internacia diplomo de Esperanto) kaj 5 helpantojn (elementa nivelo). Gelernantoj partoprenis la laborojn laŭ jena programo: “Gramatikaĵoj laŭ la metodo 11”, “La vivo de Zamenhof”, “Historio de Esperanto en la mondo”, “Historio de Esperanto en Burundo”.

Ekde la 25a ĝis la 27a de aŭgusto la partoprenintoj laboris ekde la 8a ĝis la 20a horoj, kun duhora tagmeza paŭzo, do dum 10 horoj ĉiutage. La 28an antaŭtagmeze, 36 gelernantoj faris la skriban ekzamenon. Posttagmeze oni ekskursis al la konstruata Esperanto-Biblioteko.

La 29an matene la ekzameno daŭris; oni devis instrui al aliaj. La celo estis forigi timon ĉe la novaj instruistoj, kiuj instruos Esperanton en lernejoj. Post la kontrolo de ambaŭ partoj de la ekzameno evidentiĝis, ke 30 gelernantoj sukcesis en la ekzameno.

Vespere okazis ferma ceremonio. Post la kantado de *La Espero* la prezidanto de ANEB gratulis la sukcesintojn en la ekzameno kaj kuraĝigis tiujn, kiuj ne sukcesis. Li petis al la seminarianoj instrui Esperanton al ĉiuj, kiuj pretos lerni. Li invitis ĉiujn labori forte kaj serioze por disvastigo de Esperanto en Burundo. Gratulis kaj bondeziris ankaŭ Mlossi Saidi, la prezidanto de JEBUO (Junulara Esperantista Burunda Organizo), kiu estas sekcio de TEJO.

Burundianoj intense studas por poste instrui Esperanton.



Reprezentanto de la partoprenantoj dankis la estraron de ANEB kaj la subvenciintojn de la seminario. Li diris, ke ANEB estas granda asocio kun multaj membroj en la tuta lando. Li diris, ke la biblioteko helpas multajn personojn lerni Esperanton, legi librojn, kaj dankis la donacintojn... Li fine petis, ke tiaj aranĝoj ofte okazu kaj pli bone en novaj regionoj, por fortigi la lokan movadon.

Ĉiu sukcesinto ricevis de la prezidanto de ANEB diplomon pri la ekzameno kaj atestilon pri la partopreno, kaj ĉiu nesukcesinto ricevis nur la partoprenan atestilon.

Post la disdono de diplomoj kaj atestiloj, ĉiuj eniris la klasĉambrojn por trinki limonadon kaj danci ĝis la 3a horo, kiam la elektro ĉesis.

Hassano Ntahonsigaye

Esperanto hejmiĝas en Burkino

En aŭgusto-septembro mi havis unumonatan Esperanto-instruadon kaj trejniĝon en Burkino danke al interkonsento kun la neregistara organizo “Orange Bleue Afrique” (OBA). La unua ŝtupo de mia aventuro kondukis min al interkonatiĝo kun ĉiuj oficistoj de OBA, prezento al ili de la internacia ingvo, de ĝia naskiĝo ĝis la 125a datreveno.

Mi instruis Esperanton ĉiun labortagon al kvin funkciuloj de OBA. Du (Armel kaj Victor) el ili jam komunikas parole kaj skribe en simplaj situacioj de la ĉiutaga vivo per Esperanto. Ili eĉ havigis al si korespondamikojn, kun kiuj ili ekuzas la lingvon rete. Krom la instrua materialo preparita speciale por tiu kurso, kiun mi ĉiutage adaptis al la situacio kaj bezonoj de la kursanoj, la kursanoj finlernis la libron *Metodo 11*.

La burkinaj kursanoj ĝojis konatiĝi kun Esperanto. Ĝi signifas komunan lingvon pere de kiu ili ekhavas kulturajn kontaktojn kaj kunlaborojn tra la mondo por atingi amikecon kaj bonvolon. Kaj por ke ĉiuj novbakitoj povu pli efike kaj bone progresi en la ellernado de la lingvo, estis transdonitaj al ili diversaj retligoj kun utilaj informoj.

Kroma menciinda sperto en tiu periodo estis renkontiĝo kun Antoine Drag, la sola esperantisto en Burkino antaŭ la kurso (li loĝas en Garadugu, 240 km de la ĉefurbo, kaj li mem lernis la lingvon, dum li vivis en Eburio en la 1980aj jaroj) kaj sendo de informoj rete al gazetoj en la ĉefurbo kaj intervjuo al privata radio pri Esperanto.

Adjé Adjévi

La lasta FESTO antaŭ la fino de la mondo

Por atingi FESTOn 2012 necesis veturi tra la Ĵurasa montaro kaj veni al la skistacio de Métabief piede de la Ora Monto (Mont d'Or) ĉe la limo inter Francio kaj Svislando. Estas belega montara loko kaj ankaŭ relative disa kun tamen la koncertejo en la centro. La suno kaj la bela vetero ankaŭ varmigus la etoson kaj ebligis al la partoprenantoj sunumi, bani sin en montaraj lagoj kaj ekskursi en la montaro, en la urboj Besançon kaj Neuchâtel en Svislando.

La interkona vespero okazis vendrede, la 17an de aŭgusto, kaj konsistis ĉefe el ludoj kaj poste estis malfermo de la trinkejo kun fona muzika etoso, kaj homoj babilis ĝis ne tro malfrue post noktomezo.

Sabate vespere la koncerto de Zhou-Mack Mafuila donis viglan kaj varmdancigan tonon laŭ la ritmoj de la Afrika rumbo kaj regeo por la malfermo de la arta programo de FESTO 2012.

Zhou-Mack Mafuila



Zhou-Mack, ĉefkantisto kaj ritm-gitaristo, estis akompanita de ses muzikistoj. Ili prezentis plejparte kantojn el la Esperanto-albumo *Originoj*. Kelkaj kantoj estis en la lingala kaj kikonga lingvoj, afrikaj lingvoj el Kongo. La publiko estis ĉarmita kaj kontribuis dancante kaj kunkantante la rekantaĵojn. Post la koncerto DĴ Leo startigis la diskejon kiu dancigis homojn ĝis la 4a horo.

Dimanĉe *Espo Despo* el Kopenhago okupis la scenejon kvarope. Ilia miksaĵo de popolmuziko kaj roko kun Balkanaj influoj surprizis la ĉeestantaron, kiu reagis dancante, kaj Amir, la kantisto kaj gitaristo de la bando, entuziasmigis la publikon kiu plu volis kaj repetis pliajn kantojn ĉe la fino. Sekvis ilin *Stoïc Drama*, roka triopo el la proksima urbo Belfort kun vigla rokkoncerto. Elstara kaj peza sono de gitaro, baso kaj drumo de junaj muzikistoj tre promesplenaj... La voĉo de la kantistino-gitaristino estis sorĉa kaj tre bone kongruis kun la muziko. Tuj sekve la koncertejo transformiĝis je diskejo de DĴ Leo, kiu sonigis ĝis la 5a matene.



Amir el *Espo Despo*

Lunde, la 19an, la vespero disvolviĝis laŭ kabareda etoso per koncerto de Gijom ĉe voĉo kaj piano akompanata de *Espo Despo* akustike. La rezulto estis elstara, kaj tiu kunludado alportis alian dimension pro la muzikaranĝoj al la repertuaro de Gijom, kiu kutime akompanas sin de nura piano...

La dua parto estis koncerto de *Dolĉamar*. Por tiuj, kiuj konas *Dolĉamar* kun X kaj *Dolĉamar* kun H, estis vera surprizo la nuna versio de *Dolĉamar* kun Ĉ. La nova *Dolĉamar* konsistas el Pieĉjo (Patrik Austin) kiu ne plu ludas sursceneje kutimajn instrumentojn sed elektronikaĵojn kun kantoj el la albumoj *Lingvo intermonda* kaj *Trajn' nenien*. La muziko elektroniĝis laŭ la aktuala danciga klubeca stilo. La publiko remalkovris malnovajn kantojn de *Dolĉamar* kaj *Dolĉamar* sub alia

sono-vesto kaj malgraŭ tio ili kunkantis kaj dancis.. Tiu nova muzikvojo de la artisto ankaŭ malfermas perspektivon por nova muzikĝenro en Esperanto kaj antaŭvidigas prilaboron de nova albumo de *Dolĉamar* post pli malpli du jaroj. Post la sukcesa koncerto, DĴ Leo revenis por reaktivigi la diskejon.

Marde okazis regea vespero kun Jonny M, kiu koncertis kun la asisto de DĴ Leo ĉe miksiloj. La stilo de Jonny M, kvankam regea, malsimilas al tiu de Zhou-Mack Mafuila, ĝi havas pli elektronikajn sonojn kaj foje randas ĉe la limoj de hiphopo. Jonny M ardigis la scenejon, la publiko bonege akceptis la artiston kaj kunludis kun li, reĥante lian entuziasmigan energion. La publiko kaj la artisto kunfandiĝis. Post la koncerto DĴ Leo faris sian lastan diskejan vesperon ĝis la 2a nokte.

Merkrede prezentiĝis la loka artisto Billy Fumey, kiu kantis en la arpitana (francprovenca lingvo). Billy akompanas sin per akustika gitaro kaj revivigas per siaj kantoj la arpitanan lingvon laŭ folka stilo. Postkoncerte homoj gufumis ĉe la fajro ĝis malfrunokte.

Ĵaŭde, la 22an de aŭgusto, estis la lasta tago de FESTO. Vespere la kvarpersona Pariza teatrotrupo *Kvak* prezentis la teatraĵon *Karotkapo* de Jules Renard. La aktoroj bonege interpretis la rolojn. Post la spektaklo ekis internacia vespero, en kiu la organiza teamo sin prezentis kun la helpantoj kaj kunlaborantoj, kaj pluraj partoprenantoj muzikis, kantis kaj skeĉis. La belgaj partoprenantoj prezentis *Amikejon* en Belgio, kie okazos FESTO 2013 — la unua post la fino de la mondo!

Raportis festece por vi

Flo!

Fotis Sjoerd Bosga



La Pariza *Kvak* prezentis la *Karotkapon*.



Pluraj miloj da sarlandanoj vidis la Esperanto-pavilonojn en la Germana-Franca Ĝardeno.

Lernofesto 2012

La Lernofesto okazis en dimanĉo, la 2an de septembro, en la Germana-Franca Ĝardeno, Saarbrücken. La Sarlanda Esperanto-Ligo kaj Becker-Meisberger-Instituto tie prezentis du pavilonojn kun divenrado kaj eta lernejo por efektiviĝi internacian lingvoeksperimenton.

La lernofeston vizitis proksimume dudek mil homoj el la tuta regiono, kiuj minimume vidis la du Esperanto-pavilonojn. La lingvoeksperimenton aktive partoprenis pli ol 300 vizitantoj. Vizitis nian standon ankaŭ la nova ministro pri kulturo, Ulrich Commerçon, kiu tre detale informiĝis pri la kampanjo de SEL.

La lingvoeksperimento funkciis per tri partoj: Unue la partoprenantoj devis pleniĝi sciencan demandilon. Poste ili instruiĝis pri Esperanto en la “minilernejo”, kie la vicprezidanto de SEL, Edgar Werner Müller, prezentis lecionon de la konata kurso *Mazi en Gondolando*. Poste ili venis al la divenrado por elprovadi siajn novajn lingvokononjn. Rimarkinde ofte ili tre bone tradukis la Esperanto-esprimojn en la germanan lingvon. Ĉiu sukcesinto ricevis unu glukuponon por la lernofesta pasporto, kaj kolektado de almenaŭ kvin kuponoj fine rajtigis ilin partopreni al la granda tombolo.

Do, la partoprenantoj povis facile konstati, ke helpe de minimumo da instruoj kaj surbaze de aliaj lingvokononj (Latina, franca, angla) ili komprenis kaj tradukis eĉ relative malfacilajn vortojn kaj frazojn en la Internacia Lingvo Esperanto.

Oliver Walz, la prezidanto de Sarlanda Esperanto-Ligo, konkludis, ke la Lernofesto estis entute tre komunikema kaj vizia aranĝo, do tre taŭga por realigi

la longtempan strategion de SEL. Tuterce SEL kaj Becker-Meisberger-Instituto partoprenos ankaŭ en la Lernofesto 2013.

Oliver Walz

Boatado sur la rivero Kupa

La Esperanto-societoj *Sisak* el Sisak, *Viktor Mihovilić* el Karlovac, *Mondo paca* el Velika Gorica kaj *Petrinja* el Petrinja, estis organizantoj de la 4a esperantista boatado sur la rivero Kupa en Kroatio, kiu okazis de la 31a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2012. La kvar menciitaj societoj, krom per la ideo de Esperanto, estas interligitaj ankaŭ per la rivero Kupa, kiu fluas tra la tri kroataj departementoj, en kiuj la societoj aktivas.

“La boatado estas anoncita al la Havena kontrolo en Sisak, kiu aprobis ĝin. La kroata montara savservo (HGSS), kun siaj filioj en Karlovac kaj Novska, akompanis la boatantojn per siaj teamoj en aŭtomobilo kaj en aparta boato”, — akcentas la iniciatinto kaj la ĉefa organizanto de la aranĝo Srećko Radulović, la vicprezidanto de la Esperanto-societo *Sisak*.

La boatado okazis en tradiciaj boatoj trafikantaj sur Kupa, kaj ĝin partoprenis 31 personoj en sep boatoj, kiuj navigis inter Karlovac kaj Sisak (130 km) en kvin vojoj, bivakante en la naturo sur bordoj de la rivero.

En la Esperanto-societo *Sisak* oni ne kaŝas la kontenton, ĉar la aranĝo fariĝis tradicia, kaj jam komenciĝis la preparoj por la kvina boatado, okazonta sekvontjare. Partopreno de eksterlandaj esperantistoj estas dezirinda, kaj interesiĝantoj kontaktu nin rete:

✉ esperanto.sisak@gmail.com

Srećko Radulović

Unufraze

★ La Esperanto-kulturpremio 2012, kiun la FAME-fondaĵo k la urbo Aalen asignas ĉiun duan jaron pro subtenado k stimulado de internaciaj kompreniloj, estas asignita al la franca muzikproduktisto kaj -eldonisto Floréal Martorell. (Esperanto aktuell)

★ La prezidanto de UEA Probal Dasgupta ricevis premion de la bengala literatura akademio Bangiya Sahitya Parishat, interalie, pro siaj beletraj tradukoj el la bengala al Eo. (Libera Folio)

★ La poŝtelefonoj k tabulkomputiloj, kun la operacia sistemo Android, havos E-klavaron en la versio 4.2 de Android, aperonta komence de 2013. (Ret-Info)

★ En septembro Dana E-Asocio aranĝis E-budon kun libroj k ŝildo kun la simbolo “Esperanto 125” en la evento “Gustumu la mondon”, aranĝita de la Kopenhaga Komunumo. (Landa Agado)

★ Mirejo Grosjean helpe de NESPA en aŭgusto prelegis pri Eo en pluraj lokoj de Nepalo: Akademio por sano k sciencoj, universitato Tribuban, Nepala komisiono pri homaj rajtoj, Ŝtata olea kompanio, infanĝardeno “Little World”, Nepala kolegio pri vojaĝado k turismo; pri ŝia prelegvojaĝo pozitive informis lokaj gazetoj. (NESPA komunikas)

★ 8 sep en la librovendejo *Zhongguancun* (Pekino) Long Zhang prelegis pri Eo antaŭ sciencistoj, doktoroj, altrangaj administrantoj de entreprenoj pri informa tekniko aŭ financo. (ĈIIC)

★ 11 sep okaze de la Kataluna Festotago la Kataluna E-Asocio starigis E-budon en la Kultura k Asocia Foiro en Barcelono; vespere post amasa manifestacio la organizantoj invitis paroli al la mondo el diversaj lingvoj, inter kiuj ankaŭ Eo, en kiu la mesaĝon por sendependiĝo de Katalunio diris la 12-jara Andreu Gesti Franquesa. (Josep Franquesa Sole)

★ 5 sep komenciĝis unusemestra elementa E-kurso en la Vilna Universitato (Litovio) kun 22 studentoj el diversaj fakultatoj. (Gediminas Degėsys)

★ Ekde 10 sep en la nova semestro 267 studentoj de la Scienc-Teknika Universitato de Interna Mongolio eklernis Eon en du 32-lernohoraj kursoj, kiujn gvidas Liu Baoguo, Chen Ping k Ma Jianming. (ĈIIC)

★ Kiel №48 en la serio *Oriento-Okcidento* de UEA aperis E-traduko de *Rakonto pri Kjeŭ*, granda (3254 versoj) epika poemo de Nguyen Du, tradukita de Le Cao Phan k eldonita de *The Gioi*. (GK UEA)

Kio estas Neciklopedio?



NECIKLOPEDIŬ

La brazilano Roberto Ribeiro estas la sola aktiva kontribuanto al Neciklopedio (<http://neciklopedio.wikia.com>), kiu estas eble la plej granda reta kolekto de humuraj tekstoj en Esperanto. La Ondo intervjuis lin pri ĉi tiu malmulte konata projekto.

Roberto, klarigu kio estas Neciklopedio kaj kiel ĝi rilatas al la enciklopedio Vikipedio.

Neciklopedio estas parodio de Vikipedio. Teknike ĝi similas al Vikipedio, kvankam ĝi ne apartenas al ĝi. Ekzistas neciklopedioj en multaj lingvoj — la plej grandaj en la portugala, angla, itala, hispana kaj germana, sed ekzistas eĉ en la latina. Pro kulturaj kaj leĝaj kialoj, la angla kaj la germana neciklopedioj devas averti pri “netaŭgeco por infanoj” kaj “risko ofendiĝi”. La Esperantan Neciklopedion en 2007 “trovis malplena” Chuck Smith (la fondinto de Vikipedio en Esperanto). Eble li ja kreis ĝin, sed pro ŝerco nomis sin nur “trovinto”?

Kiel vi malkovris Neciklopedion, kio plaĉas al vi en ĝi?

Mi estis frua kunlaboranto de Vikipedio, kiam ĝi estis ankoraŭ eta projekto. Kiam Vikipedio iĝis fama, ĝi allogis multajn homojn kaj aperis postuloj pri lingva kaj enhava kvalito. Eĉ akademianoj kaj verkistoj komencis redakti ĝin! Mi, kiel meza esperantisto, kiu ofte eraras, preferis post kelkaj jaroj da laboro (mi redaktis pli ol 25 mil artikolojn) forlasi la projekton kaj lasi ĝin al spertuloj. Multaj el la lingvaj eraroj de Vikipedio estas mia kulpo!

Mi konis la portugalan neciklopedion kaj kiam mi trovis la Esperantan, estis tie nur ducent artikoloj. Nun ĝi havas 2 mil 200. En Neciklopedio, oni povas skribi sen multe atenti pri gramatikaj aŭ diskuti kun akademianoj, ĉar “humuro” ne bezonas perfektan lingvaĵon. Mi opinias Neciklopedion grava por propagando de Esperanto, ĉar ĝi helpas al la publiko kompreni, ke per Esperanto eblas ankaŭ ŝerci.

Kiam idistoj volis akapari la nomon “Neciklopedio” por sia neciklopedio, internacia komitato ekzamenis Idon kaj Esperanton kaj decidis favore al Esperanto. Kurioze, multaj idistoj vizitas nian neciklopedion, ĉar mi kreis tie multajn mokaĵojn pri ili kaj ilia lingvo. Mi eĉ aŭdis pri juna esperantisto, kiu eksciis pri la Ido-skismo pro Neciklopedio.

Vi estas nun la sola aktiva aŭtoro de Neciklopedio. Kiam vi komencis kaj kio igas vin daŭrigi? Ĉu vi serĉas kunlaborantojn?

Mi komencis redakti Neciklopedion antaŭ tri aŭ kvar jaroj. Foje aperas iu alia, kiu redaktas kelkajn artikolojn, ĉefe la aŭstraliano Kalidoso. Sed ĉar nur mi partoprenas konstante, oni klasifikis la neciklopedion “ekzistanta sed neaktiva”.

Neciklopedio estas vikio, do ĉiu povas kunlabori. Kiu ne havas sufiĉan lingvokapablon por verki en Vikipedio, tiu povus ekzerciĝi en Neciklopedio. Multaj preferas okupiĝi nur pri “seriozaj” projektoj, sed eble iu ŝatos ankaŭ amuziĝi, kiel mi. Kredu al mi, ke verki estas eĉ pli amuze ol legi!

Fine, bonvolu rekomendi al niaj legantoj kelkajn interesajn artikolojn.

Tio malfacilas, ĉar ĉiu havas sian preferon. Mi ŝatas la artikolon pri Sonja Elen Kisa kaj Historio de la Mondo. Jorge Camacho diris al mi, ke al li plaĉis la artikolo pri Merdomanĝanto la 1-a. Mia filino ŝatis la artikolon pri Gronlando. Laŭ mi ĉiu komencu per siaj propraj lando kaj urbo, ĉar ŝercoj pri konataj aferoj estas pli kompreneblaj.

Intervjuis Marek Blahuš

SEK: El vidpunkto de la ĉeforganizanto

Mi alvenis en Japanion en Marto 2012 por studi dum unu semestro en la universitato de Tokio (Todai). Apud la studo mi havis la ideon kaj emon fari ion por la junulara Esperanto-movado en Japanio, kiu ŝajnis al mi ne tro stabila. Mi renkontiĝis kun diversaj homoj, kiujn mi konas de “iuj anguloj”, kaj finfine venis al la konkludo, ke estus bone organizi en Japanio etan junularan renkontiĝon, kiu povos fortigi la organizan strukturon inter japanaj junuloj kaj ankaŭ interesigi japanajn junulojn pri Esperanto.

Unue, gravis formi organizan teamon, kio komence al mi ŝajnis facila. Mi demandis diversajn junulojn (en Japanio: homoj sub 35 jaroj) kaj baldaŭ trovis ĉirkaŭ dek junulojn, kiuj ŝajnis esti entuziasmaj pri organizado de Esperanta evento... Kiel mi en la venontaj semajnoj konstatis, la simpla buŝa “jes mi faros” de japanaj junuloj signifas ne multon, do estis longa vojo ĝis mi povis trovi fiksan organizan teamon, en kiu eblis “normale” kunlabori retmesaĝe, renkontante kaj telefone aŭ foje skajpe.

Finfine venis la 13a de julio, kiam en Tokio komenciĝis la Somera Esperanto Kunveno (SEK), kaj la vojo estis preparita tiel bone, ke ĉio iris kiel planite kaj foje ankaŭ spontanee. Ĉiam okazas aferoj, kiujn oni ne antaŭvidis, kaj gravas tiujn laŭeble senstreĉe kaj tamen konscie pritrakti kaj solvi. Laŭ mi, en Japanio plej gravas la programo, kiu devas esti serioza (lingvokursoj, prelegoj...) kaj aliflanke mojosa (koncertoj, drinkado, manĝado, umado...) Ankaŭ gravas internaciaj partoprenantoj (japanoj ĉiam estas ĝojaj vidi kaj paroli kun eksterlandanoj), do tial la varbado devas okazi tra ĉiuj eblaj kanaloj.

Pro mona subteno de la Germana Esperanto-Junularo (2000 eŭroj) ni povis feliĉe pli facile plani programerojn, kaj tiel eblis en la unua vespero havi sukcesan kaj bonegan koncertan vesperon de Jonny M. (Germanio) kaj Eterne Rima (Pollando/Japanio) kun subteno de mi kiel DĴ Leo/Jamgade.

Ĉe la fermo mi petis la partoprenantojn pri opinioj pri la aranĝo, kiuj ĝenerale sonis pozitive. Speciale ĝojigis la frazo: “SEK sentigis min esti en Eŭropa IJK...” Tio montras, ke SEK havis internacian etoson, ĉar la junuloj havis senton vere esti en Esperantujo kaj ne en iu malmojosa evento.

En tiu punkto mi volas denove elkore danki al ĉiuj organizantoj de SEK, kun kiuj ni havis interesan tempon antaŭ, dum kaj post la evento. Krome dankon ankaŭ al la kursgvidanto, programergvidantoj, kaj al ĉiuj subtenantoj kaj partoprenantoj de la SEK.

Konklude

Se vi volas organizi eventon en Japanio, trovu bonan organizan teamon kaj ofte renkontiĝu. La vid-al-vida parto de preparado ege gravas, kaj sen ĝi estas malfacile libere kaj amike komuniki.

Krome gravas, ke la taskoj inter la organizantoj estu klare dividitaj, sed ankaŭ gravas fleksebleco por foje plenumi aliajn taskojn. Se la organiza teamo estas internacia, la evento ankaŭ havas pli vastan kaj internacian karakteron. Ĉiam do provu havi eksterlandanojn en la organiza teamo, aŭ almenaŭ konsiligu kun iuj.

Plej gravas amikeca kaj paca kunlaboro, kaj malhelpas malamo inter homoj aŭ ekzistantaj antaŭjuĝoj pri iu(j).

Laŭ mi, ĉiam indas partopreni en junularaj Esperanto-eventoj, ĉar ĉiuj estas malsamaj kaj ĉiam oni eksentas novan **unikan** etoson inter aliaj homoj.

Leo Sakaguchi

Esperanto bezonas amaskomunikilojn

Laŭ la tradicia metodo oni sekvas kurson en klasĉambro, iĝas membro kaj partoprenas en membrokunvenoj. Iloj por varbi homojn estas faldfolioj, budo kaj reklamanoncoj. Estas nur kelkaj novaj unuopuloj. Kostas multe da laboro por atingi tion. Ekzistas multaj estraroj. Ili kunvenas, bezonas protokoladon, financajn raportojn k.t.p.



Sed homoj ne volas esti membroj; ili nur volas partopreni en interesa agado. Ili volas esti abonanto, donacanto aŭ kliento.

Mi konas la teorion de Everett Rogers pri difuzo de novaĵoj, pri kiu skribis Dennis Keefe en *La Ondo de Esperanto* (2012, №4, №5), kun jenaj kvin grupoj de

akceptantoj:

- Grupo I (Novigantoj) 2,5 %,
- Grupo II (Fruaj akceptantoj) 13,5%,
- Grupo III (Frua plimulto) 34%,
- Grupo IV (Malfrua plimulto) 34%,
- Grupo V (Postrestantoj) 16%

Mi opinias, ke ĝenerale ĉi tiu teorio validas. Sed mi timas, ke ni ankoraŭ havas malmultan tempon. Se la afero daŭros tro longe, la organizita movado pli kaj pli malkreskos kaj malaperos. Almenaŭ en Eŭropo.

Mi vidas novan evoluon en la praktiko. Aperas novaj politikaj partioj, kiuj fulmrapide kreskas. Interreto kaŭzas rapidajn evoluojn: Twitter, Facebook k.t.p. La retkursoj pri Esperanto havas sukceson. De tempo al tempo aperas homoj, kiuj lernis Esperanton rete kaj bone parolas la lingvon.

Do ni devas atingi la grandan publikon per unu ilo. Ni bezonas grandan paŝon. Uzi la ilon devas esti facila por la publiko. Do sen kostoj kaj teknike facile.

Mi opinias, ke montri Esperanton al la publiko igos la publikon pli favora je Esperanto. La ILEI-simpozio "Lingvoj de scienca komunikado kaj edukado" en la universitato en Kopenhago en 2011 estis pruvo por mi. Neesperantistoj spertis, kiel Esperanto bone funkcias.

Kialo por lerni fremdan nacian lingvon povas esti, ke oni volas scii pli pri la lando kaj la loĝantoj. La avantaĝo estas pli rektaj kontaktoj, eĉ se temas pri malfacila lingvo. Eble ekzistos pli da kompreno kaj amikeco poste.

Same por Esperanto. Por Esperanto temas ne pri unu lando, sed pri la tuta mondo, do ĉiuj landoj de la mondo. Legado, televidrigardado kaj turismo estas iloj. Eble ankaŭ por Esperanto ekzistos pli da kompreno kaj amikeco inter la popoloj, se ili povas komuniki rekte. Sento de mondĉivitaneco kreskos. Kondiĉo estas, ke pli da homoj devas regi Esperanton por realigi tion.

La plej bonaj manieroj por atingi la grandan publikon estas radio kaj ĉefe televido.

Unu maniero estas programo en ekzistanta radio- aŭ televid-stacio.

Alia, multe pli bona, maniero estas propra radio- kaj televidstacio. La programoj devas esti pli alogaj ol tiuj de naciaj stacioj. La nura fakto, ke vi elsendas en Esperanto ne konvinkos la publikon.

Por radio mi vidas tri eblajn staciojn: unua kun parolataj programoj, dua kun tradicia folkloro muziko kaj la tria kun moderna rock/rap/house muziko. Por mi pli gravas la unua,

ĉar oni povas elsendi programojn pri Esperanto kaj per Esperanto (pri normalaj temoj).

Por televido oni povas sendi programojn pri Esperanto (kursoj, novaĵoj pri la movado) kaj ĉefe per Esperanto. Mi pensas pri programoj el pluraj landoj de la mondo kun esperantaj subtitoloj. Povus esti serioj, teatraj kaj dokumentaj filmoj (pri politiko, historio, naturo, scienco k.t.p.).

Satelito estas bona ilo, sed multekosta. Interreto estas iom malpli multekosta.

Kiu pagos? Tio estas malfacila demando. En la baldaŭa estonteco ne estos entreprenoj, kiuj volas reklamanonci. Luigi tempon ankaŭ ne baldaŭ sukcesos. Eble estos organizoj, kiuj volas pagi, por ke ilia programo estu sendota. La plej granda ebleco estas donacoj. Sed estas demando ĉu la donacoj sufiĉos. Kaj poste estas demando kiu faros tion? Eble ekzistas kelkaj entuziasmuloj, kiuj volas fari tion.

Jam ekzistas du organizaĵoj:

Radio: <http://muzaiko.info/>

Televido: <http://www.livestream.com/esperanto>

Rudi Koot

Eta historia korektendaĵo

Estis plezuro legi pri la interesa renkontiĝo en orienta Turkio en la junia numero (p. 10). La vizititaj lokoj ja estas signifoplenaj, kiel oni mencias, kaj mi bonŝancas, ke antaŭ dek jaroj mi havis mem la okazon ilin vidi. Mi esperas ke iam mi povos reiri kaj akompaniĝi de lokaj samideanoj.

Je la fino de la raporto oni aludas la romian fortikigitan urbon Dara, kiun konstruigis la imperiestro Anastazio la unua (491–518 p. K.). Poste ĝin plifortigis la imperiestro Justiniano la unua (527–565), kiel detale priskribas la historiisto Prokopio de Cezareo; se legantoj interesiĝas pri li, notindas ke troveblas enrete esperantlingva artikolo mia pri li kaj la epoko de Justiniano (teksto de IKU-prelego en 2008, vidu <http://www.Ruor.uottawa.ca/en/handle/10393/12754>). Sekve, la persa reĝo Dario la unua (522–486 a.K.) ne rilatas al Dara, sed la evidenta simileco de la nomoj ekde la komenco supozigis homojn, ke estas ia ligo inter la du, kiel atestas kronikistoj.

Piednote via,

Geoffrey Greatrex

13 jun 2012 en Krakovo forpasis

Jadwiga Gibczyńska (1924-2012)

konata pola aktorino, kiu ekde 1959 laboris en multaj teatroj. Ŝi esperantistiĝis en 1963 kaj de tiam plurfoje aktorin kaj deklamis en Universalaj Kongresoj kaj aliaj esperantistaj renkontiĝoj en diversaj landoj. En Krakovo ŝi fondis kaj gvidis la Esperanto-teatron *Areno*. Honora membro de UEA (1997).

18 jul 2012 en Kordovo (Argentino) forpasis

Enio Hugo Garrote (1928-2012)

profesie librovendisto, esperantisto ekde 1946, li gvidis Esperanto-kursojn, kunlaboris en *Sennacieca Revuo* kaj aliaj gazetoj, tradukis plurajn verkojn en Esperanton, i. a., por kelkaj volumoj de *Argentina Novelaro*, verkis sub la pseŭdonomo Magistro Eŭgo kvar volumetojn de *Kordobaj akvafortoj*.

Ni funebras kaj kondolencas.

Sciencisto, filo de la poetoj

Jubilea eseo de Grigorij Arosev



La eta Lev kun siaj famaj gepatroj-poetoj en 1915 aŭ 1916.

Longa homa vivo en la lastaj jarcentoj estas interalie promeso de drastega ŝanĝo de ĉirkaŭa medio. Ekzemple la verkisto Bernard Shaw naskiĝis en 1856, en la jaro de la invento de celuloideo, kaj mortis en 1950, kiam estis prezentita la unua kreditkarto. Krome li vivis dum regado de preskaŭ 30 britiaj ĉefministroj kaj postvivis plurajn gravegajn eventojn, interalie ambaŭ mondmilitojn. Sed mi aŭdacas opinii, ke malgraŭ tiom da ŝanĝoj Shaw naskiĝis kaj mortis en ŝtato, kiu ĉiam restis pli-malpli sama.

Sortoj de homoj, naskitaj en la komenco de la 1910aj en la Rusia imperio, kaj evitintaj mort(ig)on dum la interna milito 1914–1918, malsataj jaroj, Stalina reprezaliado, kaj same la mondmilitoj, estas efektive mirindaj. Ili naskiĝis en unu ŝtato, preskaŭ la tutan vivon loĝis en alia, kaj siajn lastajn jarojn pasigis en tria. Tian vivon havis Lev Gumiljov — elstara sciencisto, filo de Anna Ĥmatova kaj Nikolaj Gumiljov. La 1a de oktobro estas la tago de la centjariĝo de Lev Gumiljov.

Apenaŭ estas alia rus(i)a triopo “patro-patrino-infano” same grava por la rusa kulturo. La gepatroj estas mondfamaj poetoj, kiuj ne bezonas apartan prezenton. Ili geedziĝis en aprile 1910, post du jaroj naskiĝis Lev. En 1914 la interrilatoj de Ĥmatova kaj Nikolaj Gumiljov malvarmiĝis, kaj en 1918 ili divorcis — pli frue ili ne faris tion, ĉar antaŭ la revolucio oni ne povis divorci havonte la rajton poste denove edz(in)iĝi. Bedaŭrinde la vivovojo de Nikolaj Gumiljov estis tre kurta — li estis false akuzita je komploto kaj pafmortigita en 1921. La preciza dato de lia morto kaj la loko de la enterigo estas ĝis nun nekonataj. Male, Anna Ĥmatova vivis longe (1889–1966) kaj spertis ĉion — famon, rekonon, malfeliĉon kaj persekuton. Multaj sortaj elprovoj estis ligitaj kun la filo Lev.

En la unuaj jaroj li loĝis aparte de la patrino — en la urbo Beĵeck ĉe sia avino. Nur en 1930 li rekuniĝis kun Ĥmatova. Li studentigis ĉe la historia fakultato de la Leningrada universitato en 1934 jam havante mallongan sperton de malliberiĝo. Jam en 1935 li estis eksstudentigita kaj arestita la duan fojon, ĉi-foje pro “kontraŭsoveta konduto” (liaj samstudentoj

denuncis lin). Ambaŭ malfeliĉoj daŭris nelonge — dank’ al letero de Ĥmatova al Stalin, Lev estis liberigita kaj reakceptita en la universitaton. Sed en 1938 li denove estis arestita kaj pasigis kvin malfacilegajn jarojn en la prizono — en la severa norda urbo Noriljnsk. La kaŭzo de la aresto estis absurda: Gumiljov oponis sian pedagogon, kiu asertis, ke Nikolaj Gumiljov neniam vizitis Abisenion, kiu jes vizitis ĝin. La pedagogo ne sciis, ke lia “aroga” studento estis la filo de la poeto. Jam post la denunco oni atribuis al Lev gvidadon de studentoj-teroristoj. Ĝuste tiam, inter 1935 kaj 1940, Anna Ĥmatova verkis sian faman poemon *Rekviemo*, kie interalie estis jenaj versoj (laŭvorta traduko):

*La edzo estas en tombo, la filo estas en prizono
Preĝu pri mi.*

Post la liberiĝo li devige restis en Noriljnsk. En 1944 li propravole soldatiĝis kaj servis ĝis la fino de la mondmilito. En 1946 li finfine diplomiĝis, kaj post du pliaj jaroj iĝis kandidato de historio (en Sovetunio kaj nun en Rusio la unua scienca grado estas “kandidato de scienco” kaj nur la dua, supera, “doktoro de scienco”).

Sed en novembro 1949 li estis arestita la kvaran fojon (pro “kontraŭsoveta agado”) kaj kondamnita por dek jaroj da mallibero. Nur en 1956, tri jarojn post la forpaso de Stalin, li estis liberigita.

En 1961 kaj 1974 li sukcese doktoriĝe disertis pri respektive historio kaj geografio, tamen post la dua fojo oni rifuzis atribui al li la duan doktoran gradon. En la unua scienclaboro temis pri la pratjurkoj, la temo de la dua estis “Etnogenezo kaj biosfero de la Tero”.

Ĝuste la etnogenezo fariĝis unu el plej gravaj laboroj de lia vivo. Lev Gumiljov proponis komplekson de novaj metodoj de la etnogeneza esploro, kiujn konsistigas samtempa pristudo de historiaj scioj pri la klimato, geologio, geografio, arkeologio kaj kulturo. La bazo fariĝis lia originala “pasiula teorio de entogenezo”, pere de kiu Gumiljov klarigis konsekvencojn de la historia procedo.

La vorto *pasiulo* nur svage tradukas en Esperanton la originan terminon *passionarij* (angle: *passionarity*). Mi uzas la radikon *pasi-* nur pro la simileco kun la origina vorto, ĉar la senco estas pli komplika kaj profunda. Laŭ Gumiljov, *pasiuloj* estas homoj, kiuj denaske kapablas absorbi el la ekstera medio pli da energio, ol necesas nur por persona konserviĝo kaj reproduktiĝo. Tiaj homoj uzas la energion por konscie ŝanĝi la ĉirkaŭan medion. *Pasiuloj* estas novtipaj homoj kiuj rompas la vivajn tradiciojn, pro kio ili konfliktas kun la socio. Ili sin organizas en grupojn, kiuj fariĝas kernoj de novaj etnoj, kaj proponas novajn ideologiojn.

Gumiljov ekzemple opiniis la prarusojn (antaŭ la 14a jc) kaj la nunajn rusojn malsamaj etnoj, kaj la unuaj same diferencigis de la pli frua etno — slavo. Laŭ Gumiljov, etnoj diferencigis unu de la alia ne per kulturo, nivelo de edukiteco aŭ metodoj de produktado, sed per kondukataj stereotipoj, kiujn homo en la unuaj monatoj absorbas de siaj gepatroj kaj samaĝuloj, kaj poste uzas dum la tuta vivo. En ĉiu etno



Lev Gumiljov ĉe sia labortablo.

funkcias ne konsciaj decidoj, sed perceptoj kaj kondiĉitaj refleksoj.

Tamen la teorio de Gumiljov ne estas agnoskita de ĉiuj, kaj pluraj sciencistoj akre kritikis ĝin. Krome severe kritikitaj estis ankaŭ liaj teorioj kaj supozoj pri kelkaj ŝajne-sendubaj faktoj el la landa historio... Nur en 1991 li fariĝis akademiano de la naturscienca Akademio.

Sergej Beljakov, nuntempa biografo de la sciencisto, mencias en sia libro: “Restintaj fotoj de Lev Gumiljov embarasas. Ŝajnas, ke foje anstataŭ li estis fotitaj aliaj homoj”. Infanaĝe kaj en adoleskanteco li similis la patron, aspektante knabo el bona familio. Sed kompreneble prizono influegis lian eksteron. Laŭ Beljakov, “de la foto, farita en decembro 1949 (el la krima dosiero) nin rigardas ankoraŭ sufiĉe juna vizaĝo de iu kaŭkaziano. Post du jaroj (foto el la prizono apud Karaganda) Gumiljov kvazaŭis oldan uzbekon aŭ kazaĥon”. Sed jam ekde la 1950aj jaroj li multege similis la patrinon kaj ne nur vizaĝe, sed ankaŭ voĉe. Por ĉiuj la simileco estis evidenta, sed Gumiljov mem ne multe ŝatis tion.

En la jam menciita *Rekviemo* Aĥmatova skribis: “Vi estas mia filo kaj mia hororo”. Gumiljov riproĉis ŝin, ke siatempe ŝi ne faris ĉion necesan por liberigi lin el la prizono. Ŝi opiniis la riproĉojn maljustaj. Apenaŭ nun ni povas kompreni, kiu pravas, sed ĉiuokaze la situacio, kune kun malfeliĉaj junaj jaroj, kiam, post la reveno el Beĵeck, Gumiljov loĝis kun la nova edzo de Aĥmatova (Nikolaj Punin malbone traktis la junulon, kio eĉ pli malfaciligis lian vivon), ne servis por bono de iliaj interrilatoj. En la lastaj kvin jaroj de sia vivo Aĥmatova tute ne interkomunikis kun sia filo.

Lev Nikolajevič Gumiljov forpasis la 15an de junio 1992 en Sankt- Peterburgo, jam post kiam USSR oficiale disfalis. Sendube post la kvar arestiĝoj kaj pluraj aliaj kurbiĝoj de sia sorto kaj de la sortoj de aliaj homoj, li ne povis lojale akcepti la sovetian ideologion kaj politikon. Junaĝe li revis pri reestabliĝo de la monarkio. Post la dua enprizonigo li evitis politikajn interparolojn, sed li ne fariĝis obeema. Ankaŭ en la lastaj jaroj, kiuj estis pli liberaj, li povis diri aŭ skribi ion kontraŭsovetian. La ruiniĝo de USSR fariĝis por li nek surprizo, nek malĝojo.

La nomon de Gumiljov havas la Eŭroazia universitato en Astano (Kazaĥstano). Li edziĝis en 1967, sed ne havis infanojn. La vivo de Lev Gumiljov estas ekzemplo de kuraĝo, persistemo kaj fideleco je la scienco.

Originala beletro en BibLO

BibLO estas siglo por la biblioteko de *La Ondo de Esperanto*, kaj do ĝi estas biblioteko de ĉi tiu internacia magazino. BibLO estis fondita en 1998 surbaze de la privata kolekto de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov.

La biblioteko kreskas danke al donacoj, aĉetoj, interŝanĝo kaj danke al libroj, kiujn oni sendas al *La Ondo de Esperanto* por recenzo (tiucele en *La Ondo* estas recenzataj nur du-ekzemplere ricevataj libroj). La listoj de la ricevataj libroj ĉiumonate aperas en *La Ondo de Esperanto* kaj ekde la 2003a jaro ankaŭ en la reto.

La ĉefa celo de BibLO estas kolektado, registrado kaj diskonigo de libroj en/pri Esperanto kaj interlingvistiko, eldonitaj en Ruslando kaj Sovetunio. Jam aperis kvar eldonoj de tiutema bibliografio. Sed ni laŭeble kolektas ankaŭ librojn pri esperantologio, historio kaj kulturo de Esperanto, tradukojn de la rusa beletro kaj originalan beletron.

La ĵus pretigita bibliografio listigas ĉiujn librojn de BibLO, kiuj estas originale verkitaj en Esperanto. La libroj estas dividitaj je du grupoj: (1) antologioj, krestomatiaj kaj similaj plurautoraĵoj kolektoj kies aŭtoroj ne estas indikitaj en la baza bibliografia priskribo; (2) verkoj de aŭtoroj nomitaj en la bibliografia priskribo. Estas registritaj ankaŭ libroj miksitaj, kiuj enhavas ne nur originalajn verkojn beletrajn, sed ankaŭ tradukitajn kaj nebeletrajn verkojn. Krome estas registritaj kelkaj libroj de bone konataj Esperantaj aŭtoroj (Eroŝenko kaj Waringhien) verkitaj nacilingve kaj poste tradukitaj en Esperanton. Aliflanke, ni ne konsideris klare didaktikajn legolibrojn, kaj do en la listo estas, ekzemple, la romano *La verda koro* de Julio Baghy kaj “facilaj rakontoj” de Sten Johansson, sed mankas *Gerda malaperis!* de Claude Piron kaj similaj verketoj.

Ĉi tiu bibliografio ne havas sciencan valoron, ĉar ni uzis koncizan bibliografian priskribomanieron, kiu tamen sufiĉas por scii, kiuj libroj estas en BibLO (interalie, por eviti aĉeton de duoblaĵoj). Ĝi do estas nura librolisto.

Je la 6a de aŭgusto 2012 en BibLO estas registritaj 331 originalaj beletraj libroj, inkluzive de reeldonoj. Kelkaj libroj, ricevataj recenzocelo, dume ne estas registritaj, kaj ni enmetos ilin en la liston post la apero de recenzoj.

Inter la aŭtoroj (nur unuaŭtoraj libroj, ne diversaŭtoraj kolektoj) la plej reprezentita estas István Nemere, kies 16 libroj estas en nia kolekto; sekvas Julio Baghy, Sten Johansson (po 11 libroj), Mikaelo Bronŝtejn kaj Vasiliĝo Eroŝenko (po 9), Lorjak (7), William Auld kaj Raymond Schwartz (6) kaj Kálmán Kalocsay (5).

Ni estos kontentaj, se ĉi tiu listo estos utila ne nur por ni, sed ankaŭ por interesatoj pri la Esperanta literaturo. Vidu ĝin en nia retejo: <http://esperanto.org/Ondo/Biblo-or.htm>

Halina Gorecka

Kvakerismo: sendogma religio kun radikoj en angla kristanismo, bazita sur la kredo ke ĉiu homo povas sperti rektan inspiron el Dia fonto. Tion ni elserĉas dum silentaj kunvenoj. Konatiĝu kun kvakera pensado historia kaj nuntempa per engrupa reta interskribado pri kvakeraj tekstoj. Ĉiom en Esperanto.

Kvakera E-Societo: <http://www.noos.ch/kes/>

Informoj/aliĝo: [✉ douglas.esperanto@gmail.com](mailto:douglas.esperanto@gmail.com)

Tri dokumentoj pri Marko Zamenhof

de Aleksander Korĵenkov

Antaŭ 175 jaroj, la 27an de januaro (Gregorie: la 8an de februaro) 1837 en la urbo Suwałki (Pola Reĝlando en Ruslando) en la familio de Fajba Voljfoviĉ kaj Rajna Percovna Zamenhof naskiĝis Motelj, pli bone konata kiel Mark Fabianoviĉ (Esperante: Marko) Zamenhof, la patro de la aŭtoro de Esperanto. Okaze de ĉi tiu datreveno ni jam aperigis artikolon¹ pri liaj pedagogiaj verkoj, surbaze de la librokolekto en la Ruslanda Ŝtata Biblioteko (Moskvo). Nun ni prezentas pliajn dokumentojn pri Marko Zamenhof, kiuj estis trovitaj en la Ruslanda Ŝtata Historia Arkivo (Sankt-Peterburgo).

Ruslanda Ŝtata Historia Arkivo (ruse РГИА = RGIA) estas unu el la plej grandaj kolektoj de dokumentoj en la mondo. Ĝi enhavas pli ol sep milionojn da dokumentoj. La kolekto estas dividita je pli ol mil fondaĵoj (ruse: фонд), konsistantaj el multegaj fakoj (ruse: опись).

En la fondaĵo №776 estas konservataj dokumentoj de la Ĉefa Administrejo pri Presaferoj de la Ministerio pri Internaj Aferoj de Ruslando, ofte nomata la Polica Ministerio. En la 20a fako de la 776a fondaĵo troviĝas 1539 dokumentaroj el la jaroj 1878–1895. Inter ili estas la dokumentaro (ruse дело, t. e. afero) №582 pri “allaso de la instruisto de la germana lingvo Zamenhof al laboro en la Varsovia Cenzura Komitato”². Ĉi tiu afero entenas 11 dokumentojn inkluzive de “Formulara listo pri la ŝtatservado de la instruisto de la germana lingvo de la Varsovia 1a Vira Progimnazio³ Mark Fabijanoviĉ Zamenhof”, kompilita je la 25a de februaro 1883.⁴

Ĉar mi trovis ĉi tiujn dokumentojn nur en oktobro 2009, mi ne povis uzi ilin en la unua eldono de *Homarano*⁵, premiare prezentita fine de julio 2009 en Bjalistoko. Sed surbaze de la afero №582 mi verkis studojn pri la kariero de Marko Zamenhof en ŝtataj lernejoj⁶ kaj pri lia cenzurista agado⁷, kaj en 2011 mi utiligis la trovitajn dokumentojn en la dua eldono de *Homarano*⁸.

El la servolisto ni scias, ke Marko Zamenhof ricevis hejman edukadon kaj en 1858 plenumis en la Grodna gubernia instruista komisiono ekzamenon por la ofico de instruisto en ŝtata lernejo por judoj.

Tiuj lernejoj (еврейские казённые училища) estis fonditaj en Ruslando, por ke judoj povu ricevi ne nur la tradician religian kleron, sed ankaŭ la ĝeneralan, kiu helpus al ili integriĝi en la socio. Sed, ricevinte la instrurajton, la 21-jara Marko ne uzis la rajton kaj dediĉis sin al pli enspezigaj librotenado kaj privata instruado. Nur ok jarojn poste, la 3an de aprilo 1866, li eklaboris kiel instruisto de la rusa lingvo kaj aritmetiko en la 2a Bjalistoka lernejo por judoj. Lia ŝtata salajro estis tre malgranda: nur 160 rubloj jare, sed samtempe li plu laboris private. En la ŝtata porjuda lernejo li instruis ĝis la 5a de novembro 1873.

En la ŝtat-oficistaj listoj mankas privataj okupoj, pro kiuj la ŝtato ne pagis salajron, nek donis ordenojn kaj pensiojn. Tamen en RGIA estas troveblaj iom da informoj pri privataj instruistoj — ja la ŝtato ne povis plene lasi edukadon de siaj

ŝtatanidoj al arbitro de entreprenemaj klerigistoj, kaj tiuj siaflanke petadis de la ŝtato subvenciojn, impostajn avantaĝojn k. s.

En majo kaj novembro 2010 mi denove iris Peterburgen por serĉi en RGIA spurojn de Marko Zamenhof en la fondaĵo №733, kie estas entute 109 mil 823 aferoj de la Ministerio pri Popola Klerigo de Ruslando. Mi trovis kvar aferojn, kiuj koncernas la patron de Doktoro Esperanto. Tri el ili estas en la fako №189, kiu enhavas 661 aferojn pri porjudaj lernejoj el la jaroj 1863–1881. Ni vidu ilin laŭvice.

JUNA INSTRUISTO VERKIS LERNOLIBRON

En Bjalistoko Marko Zamenhof realigis sin en la kleriga sfero ne nur kiel pedagogo kaj organizanto, pri kio oni scias el pluraj fontoj, sed ankaŭ kiel aŭtoro. En la arkivo ni trovas aferon №54 kun la titolo “Pri peto de la judo Zamenhof pri subvencio por presado de la lernolibro de la germana lingvo, kompilita de li”⁹.

Ĝi konsistas el du dupaĝaj dokumentoj. En la unua la Bjalistoka loĝanto Markus Zamenhof (Маркусь Заменгофъ) la 16an de februaro 1864 petas la Ministraron de Popola Klerigado, Lian Altan Generalan Moŝton, Efektivan Ŝtatan Konsiliston Aleksandr Vasiljeviĉ Golovnin doni monon por eldoni sian lernolibron de la germana. En la dua dokumento, datita la 7an de aprilo 1864, la ministro rifuzas, ĉar jam estas eldonita granda nombro de lernolibroj.

Tiutempe Marko Zamenhof estis nur 27-jara, kaj poste li daŭrigis siajn klopodojn, kaj ni scias, ke lia *Lernolibro de la germana lingvo por rusa junularo*¹⁰ estis prespermesita la 5an de decembro 1870 kaj aperis en 1871 en Varsovio. Ĝi havis 14 eldonojn, la lasta aperis en 1899¹¹.

SUKCESA SUBVENCIPETO

Oni scias, ke en Bjalistoko Marko Zamenhof eklaboris unue kiel librotenisto kaj hejma lingvoinstruisto en la riĉa Bjalistoka familio Zabłudovskij. La 21an de aŭgusto 1864¹² li fondis privatan lernejon-internulejon (девичий пансион) por judaj knabinoj, en kiu li mem instruis¹³. En 1865 en ĝi lernis 63 knabinoj. La duklasa lernejo de Motelj Fabijanoviĉ (Мотель Фабиянович) Zamenhof konkurencis kun simila lernejo de Avraam Samujloviĉ Kagan kaj Lev Avraamoviĉ Plonskij kun 83 lernantinoj en 1865¹⁴.

Pri ĉi tiu lernejo de Zamenhof oni povas ekscii en la afero №160 el la fako №189 de la 733a fondaĵo. La afero havas iom mallertan titolon “Afero de la Departemento de la Popola Klerigado koncerne la peton de la kuratoroj observantaj la funkciadon de la popolaj lernejoj en Bjalistoko pri ĉiujara pagado de subvencio el la kandela imposto¹⁵ al Zamenhof, posedanto de porknabina lernejo en Bjalistoko”¹⁶.

Ĉi tiu afero, komencita la 13an de majo 1866 kaj finita la 15an de septembro 1873, enhavas 18 dokumentojn sur entute 20 folioj.

La unua dokumento, skribita sur ambaŭ flankoj de du grandaj folioj, eble estas la plej interesa, ĉar ĝi pozitive karakterizas Zamenhofon kaj ties lernejon, kaj ni aperigas ĝin komplete (la faksimilon vidu sur la 21a paĝo), kun korekto de nur kelkaj mallertaĵoj — ja eĉ tiuj judoj, kiuj okupiĝis pri edukado en la juda urbeto Bjalistoko ne kapablis verki ruse same bonstile kiel la rusaj verkistoj.

Al Lia Alta Generala Moŝto,
Sinjoro Ĉefprokuroro¹⁷ de la Sankta Sinodo
kaj Ministro de la Popola Klerigo,
grafo Tolstoj

De la subskribintaj kuratoroj, elektitaj de la Bjalistoka Juda Komunumo por observado de la funkciado de Popolaj Lernejoj en Bjalistoko.

Humila Raporto

En la urbo Bjalistoko ekde aŭgusto 1864 funkcias privata Porjuda knabina lernejo, en kiu lernas preskaŭ 80 junulinoj, inter kiuj 18 sen pago, posedata de la instruisto Motelj Zamenhof, tre konsciencie efektiviganta la aferon de instruado de infanoj kaj ĝuanta ĝeneralan favoron de la loĝantoj de la urbo Bjalistoko, pri kio raportis s-ro Direktoro de Bjalistokaj Lernejoj la 29an de novembro 1865, en la dokumento №965, al Sinjoro Estro de la Vilna Lerneja Regiono.

En ĉi tiu raporto s-ro Direktoro de lernejoj, sekve de la peto de la Bjalistoka Juda Komunumo, farita de la Bjalistoka Negocisto de la 1a gildo¹⁸ Volkovyskij, kaj pro sia propra konvinko pri la senduba utileco de ĉi tiu lernejo, petis ĉiujare pagi al Zamenhof 300-rublan subvencion el la kandela imposto, ĉar la malgranda monsumo, kiun la Lernejestro kolektas de la lernantoj, tute ne kompensas la konsiderindajn elspezojn de la lernejo. Sed ĉi tiu subvencipeto dume restas neplenumita, ĉar s-ro Estro de la Vilna Lerneja Regiono en sia letero al s-ro Grodna Guberniestro sciigis, ke ĉar la Ministerio de la Popola Klerigo pro la malgranda sumo de la Kandela imposto rifuzas doni subvenciojn al privataj lernejoj kaj, ne vidante la eblecon doni ĉi tiun subvencipeton al la pritrakto de la Ministerio, petis s-ron Grodnan Guberniestron helpi en serĉado de lokaj rimedoj por subteni ĉi tiun lernejon. Pro tio s-ro Grodna Guberniestro en decembro 1865 ordonis al la Bjalistoka Urbestro proponi al la Bjalistoka Juda Komunumo ekokupiĝi pri serĉado de lokaj rimedoj por subtenado de ĉi tiu Lernejo.

Poste la Bjalistoka Urbestro, per sia tagordero №1092 de la 22a aprilo ĉi-jara, sciigis al ni, ke laŭ ĝia propono la Bjalistoka Juda Komunumo kompilis komunuman decidon pri tio, ke ni, kiel elektitoj por observado pri starigo kaj funkciado de porjudaj Popolaj lernejoj en Bjalistoko, pledu pri ĉi tiu afero en la Ministerio de Popola Klerigo, ĉar tute mankas lokaj rimedoj por doni la petitan subvencion al la Lernejestro Zamenhof.

Konsiderante, unuflanke, la pozitivan utilon, kiun alportas la privata Lernejo de Zamenhof en la grava afero de la rusa edukado de Judaj knabinoj en Bjalistoko, kiun utilon rekonas kaj la Lerneja kaj la Gubernia Estraroj, kaj, aliflanke, konsiderante neeblo de plua ekzistado de ĉi tiu utila kaj bezonata Lernejo sen ekstera helpo, kaj konsiderante, ke siaflanke la

Bjalistoka Juda Komunumo krom la ĉ. 1900-rubla sumo, ĉiujare pagata kiel la kandela imposto, havas grandajn elspezojn por la du popolaj lernejoj fonditaj en Bjalistoko kaj por la refondita ĉe la urba Talmudtorao¹⁹ duklasa instruado de la rusa lingvo por la malriĉaj Judaj Knaboj, pro kio la Komunumo ne plu havas rimedojn por subteni privatajn lernejojn, kiuj tamen laŭ la leĝoj povas ricevi subvenciojn el la kandela imposto, kaj konsiderante ke la alia Lernejo por Judaj knabinoj, posedata de Kagan kaj Plonskij en Bjalistoko, nun ĝuas subvencion el la menciita imposto, ni kuraĝas humile peti Vian Altan Generalan Moŝton fari decidon pri disponigo de ĉiujara 300-rubla subvencio el la sumo de la kandela imposto al la Lernejestro Zamenhof por administrado de ĉi tiu establo tre utila por ĉiuj, por ebligi per tio al Zamenhof plu administri la menciitan lernejon, kiu estas ne nur tre utila, sed ankaŭ ĉiuflanke modela.

David Mikeleviĉ Zabludovskij
Isaak [...]ckoviĉ Nejmark
Mendelj Voljfoviĉ Rajnes
Lejzer Ŝmuleviĉ Poljak


La 10an de majo 1866
u. Bjalistoko²⁰

La postaj dokumentoj enhavas, interalie, konsenton de la ministerio²¹, kiun subskribis la vicministro grafo Ivan Davydoviĉ Deljanov, posta ministro (1882–1897) kaj baptopatro de Nikandr Vasiljeviĉ Zjusmen, kiu, kiel ĉefcenzuristo de jidaj kaj hebreaj eldonaĵoj, en 1888 intrigos por eksigo de Marko Zamenhof el ties cenzurista posteno en Varsovio²², kaj plurajn aliajn dokumentojn, inkluzive de la kvitanco²³ pri ricevo de 300 rubloj, subskribita de Marko Zamenhof.

La du lastaj dokumentoj en ĉi tiu afero estis faritaj en septembro 1873, kiam la Zamenhofa familio estis sojle de forveturo al Varsovio.

La 6an de septembro 1873 Miĥail Afanasjeviĉ Malinovskij, vicestro kaj administranto de la Vilna Lerneja Regiono, kiu ampleksis kelkajn okcidentajn guberniojn de Ruslando, surbaze de la peto de la direktoro de la Bjalistokaj lernejoj, Pjotr Osipoviĉ Ronĉevskij, petis la klerigan ministerion disponigi al Zamenhof 150 rublojn pro la senĉesaj malsanoj²⁴

Kvitanco de Marko Zamenhof pri ricevo de 300-rubla subvencio por 1868 (РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 160, л. 18).



en la familio. La agado de Marko Zamenhof, kiu estis samtempe instruisto en la 2a Bjalistoka porjuda popola lernejo kaj posedanto de la lernejo por judaj knabinoj, estis nomita “utila <...> kaj en la instruado de la juda junularo kaj en la sfero de pedagogia literaturo”²⁵.

Jam la 15an de septembro la ministerio konsentis kun la subvencipeto²⁶. Cetere, ĉi tiu sumo estis konsiderinde granda por provinca instruisto — la saman sumon li estis ricevanta pro instruado dum la tuta lernojararo en la ŝtata porjuda lernejo.

MARKO Z. CEDAS SIAN LERNEJON

En la 189a fako de la 733a fondaĵo de RGIA, estas ankoraŭ unu afero, kiu interesas nin — afero №492 “Pri transdono de la Bjalistoka lernejo por judaj knabinoj, posedata de Zamenhof, al la instruisto Gvirc kun pagado de ĉiujara 300-rubla subvencio”²⁷.

La afero konsistas el nur du dokumentoj.

La unua dokumento estas letero de la estro de la Vilna Lerneja Regiono, Nikolaj Aleksandroviĉ Sergijevskij, sendita la 11an de oktobro 1873 al la kleriga ministerio. El ĝi ni ekscias, ke unu jaron pli frue, la 8an de aŭgusto 1872, komence de la lernojararo 1872/73, Marko Zamenhof, kun permeso de la estro de la Vilna Lerneja Regiono, ŝanĝis la propriecon de sia propra knabina lernejo al komuna posedo kun sia kolego kaj samnaciono Iosel Nohimoviĉ Gvirc²⁸, kiu, same kiel li, instruis ankaŭ en la Bjalistoka ŝtata porjuda lernejo.

Ni ekscias ankaŭ, ke unu jaron poste Zamenhof, kun preteksto de sia malbona sano, petis permeson transdoni sian lernejon al plena posedo de Gvirc. La estro de la Vilna Lerneja Regiono, apogante sin je la opinio de la direktoro de la Bjalistokaj lernejoj Pjotr Osipoviĉ Ronĉevskij taksis la instruiston Gvirc kapabla sole administri la lernejon kaj petis la ministerion transdoni la lernejon de Zamenhof kaj Gvirc al plena posedo de Gvirc kun plupagado de la 300-rubla subvencio²⁹.

Evidente, tiutempe la poŝto funkciis multe pli bone ol nuntempe, ĉar jam post naŭ tagoj, la 20an de oktobro 1873 la vicministro Deljanov permesis transdoni la lernejon al Gvirc kaj konservis la 300-rublan subvenciadon, kiun ĝuis Marko Zamenhof — pri tio tekstas la dua dokumento en la afero №492³⁰.

Forcedinte sian privatitan instruadon, Marko Zamenhof komence de la lernojararo 1873–1874 daŭrigis sian instruistan laboron en la 2a Bjalistoka ŝtata lernejo por judoj. Sed li laboris nelonge. La 5an de novembro 1873 li ricevis la petitan forpermeson el la ŝtata servo³¹. Li ne plu havis privatajn kaj ŝtatajn devojn kaj povis iri kun sia familio al Varsovio por daŭrigi tie sian ŝtatoficistan karieron en la Ministerio de Popola Klerigado, sed jam en gimnazia nivelo.

Krom la tri supre prezentitaj dokumentoj en la 189a fako inter pli ol cent mil aferoj de la klerig-ministeria arkivo (fondaĵo №733) estas ankoraŭ unu, kiu enhavas tre surprizajn informojn pri Mark Fabianoviĉ Zamenhof, pri kiuj pli frue skribis neniun esploranto de la Zamenhofa familio. Pri tio temos en unu el la sekvaj *Ondo*oj.

Referencoj kaj notoj

1. Korĵenkov A. *Verkoj kiuj donas honoron al la verkinto // La Ondo de Esperanto*, 2012, №2, p. 20–21; 2012, №3, p. 12–13.
2. РГИА, ф. 776, оп. 20, д. 582.

3. En progimnazioj, establita en Ruslando en 1864, oni instruis laŭ la programo de la unuaj kvar gimnaziaj klasoj.

4. РГИА, ф. 776, оп. 20, д. 582, с. 3–7.

5. Korĵenkov A. *Homarano*: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof. Kaliningrado; Kaunas, 2009.

6. Korĵenkov A. *Mark Fabianoviĉ Zamenhof, instruisto en ŝtataj lernejoj // La Ondo de Esperanto*, 2010, №3, p. 3–6.

7. Korĵenkov A. *Vera trezoro de oficista saĝo: la Varsovia cenzuristo M. F. Zamenhof // La Ondo de Esperanto*, 2010, №4, p. 10–14.

8. Korĵenkov A. *Homarano*: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof. 2a eld., kor. Kaliningrado; Litova Esperanto-Asocio, 2011.

9. РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 54.

10. Заменгоф М. *Учебник немецкого языка для русского юношества*. Курс первый. Варшава, 1871.

11. Korĵenkov A. *Verkoj kiuj donas honoron al la verkinto // La Ondo de Esperanto*, 2012, №2, p. 20.

12. Zbigniew Romaniuk surbaze de informoj en la Grodna arkivo montras, ke la lernejoj de Zamenhof kaj de Kagan kaj Plonskij funkciis jam en 1862, kaj ke Zamenhof skribis denunciojn al polico (Romaniuk Z. *Zamenhofowie w drodze do i w Białymstoku*. Brańsk, 2009, p. 24.)

13. *Адрес-календарь служащих в Гродненской губернии лиц гражданского, военного и духовного ведомств на 1867 год*. Гродно, 1867, С. 92.

14. *Памятная книжка Гродненской губернии на 1866 год*. II. Отдел статистический. Гродно, 1866, С. 49. (La familia nomo estas misindikita kiel Замейнгофъ = Zamejnhof).

15. Kandela imposto (свечной сбор). Imposto, kolektata de judismanoj kaj uzata por klerigado de ili. La ŝtataj porjudaj lernejoj estis financataj el ĉi tiu imposto, kaj la resto estis donata al privataj lernejoj por judoj.

16. РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 160.

17. Ĉefprokuroro (Обер-прокурор). Reprezentanto de la Ruslanda Imperiestro en la Sankta Sinodo de la Rusortodoksa Eklezio. Grafo Dmitrij Andrejeviĉ Tolstoj havis ĉi tiun oficon dum 1865–1880 kaj dum 1866–1880 li estis ministro pri popola klerigado. (Poste li estis ministro pri eksteraj aferoj.)

18. Gildo (гильдия). Rango de komercistoj depende de la posedata kapitalo. La komercistoj de la plej alta, la gildo (kun la deklarita kapitalo pli ol 50 mil rubloj) rajtis havi eksteran komercon, posedi marŝipojn ktp. Tiutempe en Ruslando 2% da komercistoj apartenis al la 1a gildo, 5% al la 2a gildo, kaj 93% al la 3a gildo.

19. Talmudtorao (Талмудтора). Elementa religia lernejo por malriĉaj judoj.

20. РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 160, Л. 1–2.

21. РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 160, Л. 7.

22. Korĵenkov A. *Homarano*, 2a eld., p. 51–54.

23. РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 160, Л. 18.

24. “... en mia infaneco mi tre ofte estadis malsana”, — skribis Lazarj Markoviĉ Zamenhof (Zamenhof L. *Mi estas homo* / Komp. A. Korĵenkov. Kaliningrado, 2006, p. 103).

25. РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 160, Л. 19.

26. РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 160, Л. 20.

27. РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 492.

28. РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 492, Л. 1.

29. Samloke.

30. РГИА, ф. 733, оп. 189, д. 492, Л. 2.

31. РГИА, ф. 776, оп. 20, д. 582, л. 4.

Baldur Ragnarsson

“Mi konsilas al vi *ne eldonigi* ankoraŭ ĉi tiujn poemojn. [...] Ĉie malesperero, barakto, morto, sango. [...] Kiel mi jam diris, mi ne estas amato de la antiintelektala poezio, nek ĝia eksperto. Kaj oni ne povas esti certa, ĉu mi ne eraras en la pritakso de io, kio infektiĝis la poezion de la tuta mondo. Eble ne infekto ĝi estas, sed io grandioza, por kies apreco mi estas tro stulta aŭ tro maljuna”. Tiel tekstas letero de Kálmán Kalocsay al Baldur Ragnarsson, aperigita en la prologo al *Ŝtupoj Sen Nomo* (1959), la unua poemaro de la islanda poeto. Evidente Kalocsay estis nek tro stulta nek tro maljuna, li nur ĝis la radikoj firmis ĉe malmodernisma grundo kaj kredeble vidis en la poezio de Ragnarsson atencon kontraŭ la tiam juna poezia vivo de nia lingvo. Ni danku la obstinon de Juan Régulo Pérez kiu eldonis la poemojn.

Dua poemaro, *Esploroj*, aperis en 1974. Dume Ragnarsson esperantigis islandan literaturon (rimarkindas la poemaro *Sub stelo rigida* de la intertempe famiĝinta Þorsteinn frá Hamri) kaj verkis plurajn faklibrojn, aperigis du islandlingvajn poemarojn (*Sub muroj de veteroj*, 1962; kaj *Prokrasto*, 1970). Ekde *Esploroj*, la poeto malpli ofte poemis en Esperanto, kvankam li sin dediĉis al eseado kaj recenzado kaj ĝenerale aktivas en la movado.

Kiam diskoniĝis la morto de William Auld (la 11an de septembro 2006), la Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) devis trovi novan kandidaton de la esperantistaro al Nobel-premio pri literaturo kaj vidis en Baldur Ragnarsson la plej taŭgan. Mauro Nervi, tiam prezidanto de EVA, redaktis la plenverkaron de Ragnarsson kiun *Edistudio* publikigis en 2007 kun la titolo *La Lingvo Serena*, kaj invitis lin prelegi en la Itala Kongreso en Pisa samjare. Post tiu sperto la poeto ne ĉesis verki novajn poemojn kaj aperigis ĉe *Mondial* (Novjorko) *La Neceso Akceptebla* (2008, LNA) kaj *La Fontoj Nevideblaj* (2010, LFN).

La poetiko de Baldur Ragnarsson impregnitas je modernismo; sed kiel difini la modernismon? Klarigo iel supraĵa restus ĉe la manko je rimoj kaj klasika ritmo, sed bonan respondon donis, malgraŭvole, Kalocsay mem: la modernisma poezio parolas malpli al intelekto, celebras “pasion kaj volon super racio kaj sistemigo”¹ kaj revolucias la lingvon semantike kaj gramatike. Eĉ



la rilato inter la poeto kaj la leganto draste ŝanĝiĝas: la leganto ne plu ricevas “plezuron”, sed ankaŭ “streĉon”; por kompreni la modernisman poezion la leganto devas pli ol antaŭe senti sin aktiva kunforĝanto de la versa senco. Jen, ekzemple, modernisma poemo rimohava en kiu ĉiutagecaj vortoj (kiel cigno) morfologie ŝanĝiĝas kaj aperas neomorfismoj, t. e. “ne kutimaj kunmetoj, eble laŭokaze formulitaj, kies senco foje ne estas tuj evidenta”²:

*Vidante neĝon cigni krudosubon
mi sentas flokoflagron tra l' animo,
sur mensovolbo puroŝutan nubon
kaj haltas ĝoje sur la penspavimo;
rigardas kiel kovras mensokoton
kristaloj de eterna bel' kaj paco,
kaj mi decidis rompi mian troton
por ne makuli puron de l' surfaco;
spiritkomplikon benas dolĉa laco.
(Ŝtupoj Sen Nomo, DUA, XIII)*

En *Esploroj* Ragnarsson mem klarigas sian poetikon: “Por mi poezio estas esploro; kaj maniero kapti disfluantan senton por ĝin fiksi en spaco kaj tempo. [...] Ofte tiu esploro ŝajnas egali kreon, sed efektive ĝi ĉiam estas trovo de io ekzistanta, sed antaŭe nekonita aŭ nespertita aŭ nerimarkita”. La poeto iasence rekreas la realon, aŭ plibone, iĝas rigardilo (ja la signifo de la islanda vorto por poeto: “skáld”) por la realo kaj per la vortoj estigas antimondon kiu reverse spegulas la efektivon. La novaĵo, tamen, de tiu ĉi poemaro estas la Ragnarssona provo poemi malpli oblike, sed rekte, fakte kaj senornate, samkiel la greko Kavafis, kiu tre influis la islandanon ne nur en *Esploroj*, sed ankaŭ en liaj novjarmilaj poemaroj *La neceso akceptebla* kaj *La fontoj nevideblaj*. La granda influo de Kavafis sentiĝas plene en la poemoj kiuj pritraktas historiajn rolantojn kiel Pompeo (LNA, p. 20) aŭ Temuĝin (LFN, p. 10) aŭ Trakiaj bovinoj (LFN, p. 22), kiuj servas por redoni unikan perspektivon respektive pri vivesplorado, ambicioj

kaj “ekmirado en serĉado de saĝo”. Alia rimedo uzata de Ragnarsson estas la aludoj, citoj kaj nuntempigo de islandaj mitologiaj roluloj por priskribi la rolon de la poetoj kaj de la poezio: tial ekzemple aperas Huginn kaj Muninn, la korvoj de Odino, kiuj respektive signifas Penso kaj Menso, flugintaj “tra ĉiuj mondoj / konkretaj kaj spiritaj por kolekti / informojn raportindajn al sia mastro je matenmanĝo”, haltintaj rando de la balkono por iom ripozi sed ankaŭ por kolekti la raporton de la poeto liverotan al Odino, ankaŭ dio de la Poezio. Rimarkindas, ke tia dialogo estas senvoĉa, komuniĝas mense, sed rekte inter ili, same kiam Ragnarsson rekte citas nomojn de poetoj kiel Kavafis, Leopardi, Shelley kaj la gravuloj en la unua poemo en *Ŝtupoj Sen Nomo*, li fakte alparolas ilin, kvazaŭ ili ĉiuj sidus ĉe unu sama ronda tablo, ja liberaj je titoloj, grupigoj, skoloj kaj epitetoj: ili troviĝas kune en la poemokrea procezo.

Kaj alia ĉeftemo en la du lastaj poemaroj estas la reveno: ĉu iel implicite li plu referencas al la filozofio de Pjeturss³ laŭ kiu, kiam ni mortos, ni reiros al la planedoj originaj? Sendube la morto estas konstanta kaj ĉeesta en lia rezonado en la formo de la reveno: pro tio svarmas poemoj en kiuj li rakontas pri la kamparo, pri sia junaĝo kaj la homoj kiuj gravis por li; li sentas la alproksimiĝon de la “reveno” kaj strebas ne forgesi tiujn detalojn kiuj estis tiel gravaj dum la vivo. Sed li ne ĉesos rakonti ĉar, kiel la poeto Fernazo (LNA, p. 36) li povos “iom rezisti la romiajn legiojn [...] almenaŭ ĝis la fino de la poemo” ĉar li plutenas la fidon al propra Muzo kiu diris al li “Ne timu, kvankam la mondo estas vualita de mallumo, havu kuraĝon, daŭrigu vian laboron”.

Ni, la juna generacio, ŝuldas al Baldur Ragnarsson la skuon kiu silente kaj tamen efektive tremigis la literaturan terenon, kreis montojn el ebenaĵoj, trafendis pravalojn por favori fjordojn.

Nicola Ruggiero

Referencoj

1. Ragnarsson B. *La Poezia Arto // La Lingvo Serena*. Pisa: Edistudio, 2007, p. 529–592.
2. Tonkin H. *Tradicismo renkontas modernismon // La Lingvo Serena*, p. 90.
3. Vidu: (a) Ragnarsson B. *Ŝtupoj Sen Nomo, Unua, XXII // La Lingvo Serena*, p. 159–162. (b) Tonkin H. *Tradicismo renkontas modernismon // La Lingvo Serena*, p. 82–83.

Poemoj de Aleksej Pleŝĉejev

Aleksėj Nikolájeviĉ Pleŝĉejev naskiĝis la 22an de novembro (Gregorie: la 4an de decembro) 1825 en neriĉa, sed glor-historia nobela familio en Kostroma. Li ekstudis en suboficira lernejo, poste en la Peterburga universitato, sed ne finis la studojn kaj en 1845 dediĉis sin al literaturo. Tiutempe li aliĝis al la socialisma rondeto de Miĥail Petraŝevskij. Same kiel multaj rondetanoj (ankaŭ Dostojevskij, kiu dediĉis al Pleŝĉejev sian romanon *Blankaj noktoj*), en 1849 li estis arestita kaj mortkondamnita, kaj antaŭ la ekzekuto ricevis pli mildan punon — servadon en armeo. En 1856 li oficiriĝis, eksarmeaniĝis, edziĝis, renobeliĝis, poste ekloĝis en Moskvo kaj Peterburgo. Li laboris en redakcioj de tiutempaj literaturaj gazetoj ĝis 1890, kiam, ricevinte grandegan testamenton, li ekloĝis en luksa apartamento de la Pariza hotelo *Mirabeau*. Aleksej Pleŝĉejev mortis la 26an de septembro (la 8an de oktobro) 1893.

En 1846 aperis lia unua poemaro, en kiu estis la poemo *Antaŭen!*, kiu famigis lin kiel revolucionan poeton, kaj en la ombro de tiu renomo restis liaj postaj poemoj lirika, porinfanaj verkoj, noveloj, dramoj kaj multaj tradukoj el la franca kaj germana. Sed dekoj da liaj poemoj disvastiĝis tra la tuta Ruslando kiel kantoj kaj romancoj, danke al Ĉajkovskij, Musorgskij, Rimskij-Korsakov k. a. Eble lia alvoko "... en forgeso pri kverel' kaj malkonsent', / obee al la alta instruad' de Kristo, / en unu famili' kuniĝu ĉiu gent'!", proksimaj al similaj versoj de Puŝkin kaj al verkoj framasonaj, trovos ŝaton de la esperantista legantaro. (AIKO)



ELEGIO

(laŭ kanto de iu franca poeto)

Jes, mi vin amas, ĉarma kreitaĵ' tenera,
Vi estas pala stel' en nuboj de vesper',
arom' de rozo, spiro de ventet' leĝera,
aŭ son' de trista kant', sonanta ĉe river';

Amata kiel sonĝo, dolĉa sinforgeso
Sur mara bordo apud susuranta kan', –
Sen larmoj, sen ĵaluz', sen streboj al eksceso;
jen mia am' al vi – rev' pri pasinta van'...

Rigardas mi al vi, pasinta emocio
en mian menson venas, forgesita am',
kaj ĉio longe jam per dub' mokita, ĉio
de duboj forpuŝita, ne revenos jam.

Senzorga ĝu' por mi ne estas la destino:
Jen kuŝas antaŭ mi longega morna voj';
Kaj hastas mi admiri vin, ho infanino,
Almenaŭ por moment' ripozi de malĝoj'.

1846

POST LEGADO DE ĴURNALOJ

Deprime legas mi la sangoplenajn paĝojn,
kun vortoj pri konfliktoj gentaj, pri minac' –
samkiel vidas mi deprime la vizaĝojn
en familio, kie regas plu malpac'.

Profunde amas mi Patrujon kaj tutkore
deziras mi, ke ĝi floru en prosper',
sed fremdajn gentojn mi ne traktas malfavore,
en mia kor' ne estas loko por koler'.

Rakonto pri herooj en batal-kruelo
min per ekstazo brula ne vigligas jam;
kaj sendas ardajn preĝojn mi al la ĉielo,
ke al malmolaj koroj nun descendu am'.

Ke pasu tagoj de koler', malĝoj' kaj tristo,
ke, en forgeso pri kverel' kaj malkonsent',
obee al la alta instruad' de Kristo,
en unu famili' kuniĝu ĉiu gent'!

1854

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**

NASKIĜLANDE

Klinas sin malĝoje
Ĉe ravin' saliko,
Kaj ravino-fundo
Plenas de urtiko.

Orfan tombon flanke
Mi sur kampo vidis:
Sian tristan sorton
Iu mem decidis!

Ŝtipsimile nigras
Fore jen domaĉo;
Ĉu l' povrul' devenis
El tiu vilaĝo?

Tie – laborego,
Premo senespera...
Kaj naturo ĉie
Estas plej mizera!

Kavoj kaj montetoj,
Mutas la kamparo;
Super ĝi flugadas
Krie monedaro...

Ŝiras mian koron
Tiu ĉi imago...
Tristas mi fremdlande,
Ankaŭ hejme – plago.

1862

* * *

Savitas jam laŭ via volo
Kor', laca pro batala streĉ'.
Jen via am' – por mi konsolo,
Kaj vortoj – la plej sankta leg'!
Azilon mornan vi surtere
Transformis tuj al la eden',
Al viv' min vekis vi, kaj vere
Redonis la kvieton jen.
Nun mi denove sentas ĝojon,
Rigardas rekte kun aŭdac',
En viv' malkovris novan vojon,
Laŭ ĝi rapidas mi sen lac'!

1879

Kiel kolekto de krimnoveloj

Eterne Rima. Taglibro de brutulo: KD. — Donneville: Vinilkosmo, 2012.

La dua albumo de la hiphop-artisto Eterne Rima estas konceptalbumo. Krude la unua duono de ĝi konsistas el rakontoj pri la krima subgrundo, precipe pri organizita krimo kaj narkotaĵvendado.

La artisto pozas en la kovrila foto kun krona medaliono, aludo al lia pasintalbuma kanto *Reĝo de la strat'* kaj ĝenerale al gangsterrepaj kliŝoj de spito, grandema memlaŭdo kaj eventuale ŝtelitaj vestaĵoj. En lia jako estas bildoj pri samplilo el Akai MPC-serio, aparato, kiun multaj hiphopaj produktistoj uzis por kapti kaj kunmeti ritmaĵojn el malnovaj vinildiskoj. La artisto — civilnome Igor Wasilewski — tamen ne specialigas pri samplado sed pri sintezila elektronika muziko. Li verkas krome sub la artista nomo Lunatiko, kiu estas ĉefe konata pri sia tre belsona kanto *Planedo Esperanto* el la *Elektronika Kompilo* (Vinilkosmo, 2003).

Taglibro de brutulo prezentas la malbonulan parton de la duobla artista personeco de Wasilewski. La kantoj legeblas kiel krimnoveletoj. Prave, ĉar vortoplena hiphopo estas plej oportuna muzikstilo por Esperanto, kies gazetoj ĉiukaze pli interesiĝas pri la teksto ol pri la muziko.



Sed atendu kun la verda korektskribilo! La tekstoj de Eterne Rima estas skribitaj kunlige al la muziko kaj ili ne nepre funkcias sen ĝi. Vidu ekzemple: “do ekagu ek! Kaj ne perdu fek tempon. Dekfoje vi eraros, nur la pek’ estas tio ke vi fuŝon faros” (el la kanto *Estro*). Ne temas pri trompo; la teksto ja eterne rimas, sed por trovi la rimojn necesas la oreloj. La plej oportuna maniero ĝui la albumon estas aŭskultante legi la kanto-tekstojn, kiuj venas kun la kd.

Eterne Rima ŝajne jam tiom sukcese ludis per siaj “gangsteraj” aspekto kaj kantotekstoj, ke almenaŭ en recenzo pri lia antaŭa albumo *Samideano* oni serioze ofendiĝis. Tio estas troiga, ĉar vera gangsterrepo ankoraŭ ne eblas en Esperanto. Usonaj hiphopistoj estas konataj de sia riĉa lingvo, kiu inkluzivas multan

slangon, kodvortojn kaj eĉ propran ortografion — ekzemple la bandonomo Boyz N Da Hood (*Knaboj en la kvar-talo*; devus esti *Boys in the Neighbourhood*). La tekstoj de Eterne Rima plimalpli sekvas la regulojn, kiujn donis Kalocsay kaj Waringhien en la *Parnasa Gvidlibro* (1932).

Tamen abunda novumado ne necesas al Esperantaj hiphopuloj — du aŭ tri unuopaj “neologismoj” sufiĉas por ŝoki fundamentistojn. Karakterize por sia purlingvemo ankaŭ Eterne Rima volonte nomas sian ritman kantostilon rep’, en-PIV-igita volapukaĵo, kiu estas proponita de iuj leksikonistoj por eviti dusencecon. La originala nomo de tiu stilo estas “rap”.

La muzikstilo hiphopo jam antaŭe atingis pli malgrandajn lingvojn ol Esperanto. Tre konindaj ekzemploj estas la artistoj Nuuk Posse kaj Amoc, kiuj repas respektive en la gronlanda kaj en la Enar-samea lingvoj. En siaj hejmlingvoj tiuj artistoj estas traktataj kiel herooj kaj batalantoj por sia lingvo. Esperanto diferencas. Ni preferas vidi kiun ajn novan fenomenon kiel potenciale la lastan najlon al la ĉerko de la lingvo de Zamenhof.


En la posta duono de la albumo Eterne Rima traktas pli personajn temojn, sed ankaŭ politikajn demandojn. La poldevena artisto loĝas en Japanio kaj estis tuŝata de la pasintjara tertremo kaj atomenergia katastrofo en Fukuŝima. Li esprimas siajn sentojn pri la tertremo en *Trankvila estu tero* kaj repas kunlabore kun Jonny M por verda energio en *Por pli bona mondo*. En *Pri tio mi parolas* Eterne Rima malkovras sian malfidon pri politikistoj kaj la televido.

Muzike Eterne Rima sukcesas krei minacan etoson por la brutulaj kantoj, sed lia sintezila sono plej belas diskofine kaj aparte en *Tokio*, laŭdkanto por lia nuntempa hejmurbo. La brutulaj kantoj povus profiti de pli organika sono kun kelkaj ritmaj kaj instrumentaj samplaj.

Eterne Rima havas iom malfortan kantovoĉon. Tial repado estas bona elekto por li, eĉ se li ne atingas la dinamikecon de siaj sammuzikanoj Jonny M kaj Tone. Liaj tekstoj kaj ideoj tamen faras la muzikon aŭskultinda. Tiel Eterne Rima similas al la kantisto-verkistoj Lou Reed kaj Serge Gainsbourg, kiuj malgraŭ manko de granda voĉo preferis mem prezenti siajn kantojn. Ankaŭ ili kelkfoje ŝokis homojn — kaj gajnis (mal)laŭdegojn en literaturaj rondoj.

Patrik Austin

Nova senpaga e-libro: *Maigret hezitas*



La franclingva verkisto Georges Simenon estas unu el la plej legataj verkistoj en la mondo. Entute, oni eldonis pli ol 500 milionojn da ekzempleroj de liaj verkoj en kvardeko da lingvoj. En 1999 danke al Daniel Luez, al ĉi tiuj lingvoj finfine aldoniĝis ankaŭ Esperanto — per la romano *Maigret hezitas*.

La sukceso de ĉi tiu libro instigis la tradukanton kaj la eldonejon *Sezonoj* aperigi kvar pliajn librojn pri Maigret en la internacia lingvo: *Maigret kaj la maljuna damo* (2002), *Amiko el la junaĝo de Maigret* (2004), *La flava hundo* (2007), *Maigret eraras* (2009).

Ĉar la tuta presita stoko de *Maigret hezitas* elĉerpiĝis antaŭ kelkaj jaroj, la eldonejo *Sezonoj* decidis donaci la libron al la esperantista legantaro en elektronika formo.

Maigret hezitas estas la dek-kvina eldonaĵo en la e-libra kolekto de *Sezonoj* kaj la dek-unua ero en la serio *Virtuala Biblioteko*.

Ĝi estas senpage elŝutebla en la prezentomanieroj (formatoj, dosierformoj) pdf kaj epub:

<http://esperanto.org/Ondo/Libro/Libro.php>

La e-libroj de *Sezonoj* estas nur por privata legado, ne por pludistribuo. Se niaj libroj plaĉas al vi, rekomendu ilin al aliaj. Vi ankaŭ povas per la pagosistemo PayPal fari donacon al la eldonejo.

Halina Gorecka

Forgesita en la ŝranko

Tone. *Repe, Ritme, Sone...*: Demo-disko. São Paulo: [Tone], 2009.



Mi plene kulpas pri pli ol dujara prokrasto de la recenzo (la redakcio eĉ tente ekmotivis min per honorario, honeste dirante, ne tre rapidiginta la aferon), ĉar mi nek aŭskultas, nek ŝatas la repon, des pli la Esperantan. Ne opiniu min rasisto, sed blankula fanfarona fingrogesta klaŭnado ja vere abomenindas, sen ŝanco de egalrajta konkurenco kun afrikdevenaj gangsteroj, vulgare ornamitaj en kilogramojn da falsa oro sur ĉiuj partoj de muskolaj ebonitaj korpoj, kutime

malemaj lerni nian karan lingvon.

Ĉi-okaze la albumeto aperis en la tropika Brazilo, perfekte reganta la ritmo-senton, ekzemple, dum burleskaj mambadaj karnavaloj, kompare kun, ekzemple, la francoj, kvankam same fora de la idealo, kiel pluraj hiphopaj projektoj de *Vinilkosmo*, sed ĝi almenaŭ ne vokas vomspasmojn, kio en nia situacio jam estas kaŭzo por gajo.

Sub la pseŭdonimo Tone sin kaŝas Antonio Moreira Filho, lerte kaj energie deklamanta proprajn lirikaĵojn preskaŭ sen fifamaj portugalprononcaj “mundoj” kaj glutaj diftongoj. La muzikon diligente profesinivele registris eĉ tri komponistoj en diversaj sonstudioj, tamen la aŭtora diferenco tute ne disonancas, eble pro simile simplaj, eĉ primitivaj, aranĝoj, miscele maksimume akcenti atenton al la tekstaro. Laŭ mi, la poezio sufiĉe sensencas kaj naivas, didaktike filozofias, samtempe jun-eske malprofundas kaj etpezas, imprese iujn strangajn listojn ekde Hiroŝimo ĝis volapukisto.

La plej granda parto el kvar titoloj, kreitaj de Slim Rimografia en *Mokado Records*, komenciĝas per la sekteca propaganda himno *Nova kanto* je la vortoj de Aleksandras Dambrauskas. *Repe, ritme, sone* kaj *Kantu, kantu, kantu kara* nepre furoros dum kongresaj bierdiskotekoj. El la Zamenhofa *Ho, mia kor’* oni sukcesis mastrumi longan sentimental-an amromancon *Ĉu* kun ĉarma koruso de malĉastaj feinoj, taŭga kiel afrodizia fono por nokta fikado. Paron da sekvaj kanzonoj *Horo por la koro* kaj *Flanken metu* miksis DJ Nato_PK en PDD Studio — la sintezilo pli modernas, la baso pli fortas, la efekto iom deprimas. La lastan *Dancu kune, dancu plu* akompanas la grupo *NhoCuné Soul* kun tradiciaj instrumentoj en “Moving Sound Studios” — nome por ŝvita flirta sebskuado apud plaĝaj palmoj.

Mi nenion imagas pri la sorto de la artisto, nek de la distribuanto, nek ĉu oni fine desegnis la kovrilon por la promo; ŝajne eĉ la kontakta retroŝto ŝtelitis, ĉar ĝi dissendis anglalingvan spamon, sed mi sincere deziras al Tone trovi normalan eldon-ejon — li meritas ĝin.

Glebo Malcev

Ricevitaj libroj

Bydgoszcz kaj itineroj de Ludoviko Zamenhof en Pollando kaj Eŭropo / Redaktis Andrzej Grzębowski. — Bydgoszcz: Skonpres, 2012. — 20 p.; 3000 ekz. — (Donaco de ICKT “Kujavio kaj Pomerelio”).

Hirota Masaaki. *Kiel verki hajkon en Esperanto*. — Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 2012. — 60 p. — [Donaco de Japana Esperanta Librokooperativo].

Hori Yasuo. *Miaj Vojaĝoj tra la Mondo*: [Eseoj]. — Gunma: Horizonto, 2012. — 48 p., il. — [Recenzoekzemplero].

Nevelsteen, Yves. *Komputeko*: Prikomputila terminkolekto. — 2a eld., kun pli ol 500 aldonoj kaj modifoj. Partizanske: Espero, 2012. — 124 p., il.; 500 ekz. — [Donaco de *Espero*].

Ricevitaj gazetoj

Esperanto aktuell, 2012/4; Esperanto en Danio, 2012/3; Esperanto*Info, 2012/3; Frateco, 2012/97; Kataluna Esperantisto, 2012/350; La Ondo de Esperanto, 2012/8-9; La Sago, 2012/85; Monato, 2012/8-9; Norvega Esperantisto, 2012/4; Svisa Esperanto-Societo Informas, 2012/3.



Vojaĝoj de japano

Hori Yasuo. *Miaj Vojaĝoj tra la Mondo*: [Eseoj]. — Gunma: Horizonto, 2012. — 48 p., il.

Hori Yasuo estas konata japana aktivulo, aŭtoro de libroj kaj artikoloj, eldonisto... Kiel instruisto de la angla li verkis ĉiusemajne por siaj studentoj mallongajn anglalingvajn eseojn pri diversaj landoj por interesigi la studentojn pri fremdaj landoj kaj instigi ilin al lingvo-lernado. Ĉiun eseon akompanis demandoj pri la eseo kaj pri la lando mem.

Poste li decidis utiligi la eseojn por Esperanto, tradukinte ilin al la internacia lingvo kaj verkinte novajn por la libroforma eldono. Entute la grandformata libro enhavas 22 dupaĝajn eseojn. La maldekstra paĝo enhavas grandliteran eseon pri koncerna lando kaj demandojn, kiujn oni povas utiligi en grupa laboro. Sur la dekstra paĝo estas du pliaj tekstoj en malpli grandaj literoj. Por ĉiu eseo estas mapo kaj foto(j). La libro povas uziĝi en grupa studado kaj kiel eksterkursi legolibro. Ĝi ebligas konatiĝi kun multaj landoj per la persona percepto de vojaĝema esperantisto.

Halina Gorecka

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijk 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la junia tasko *Diagonaloj* venis 19 respondoj, el kiuj 17 estas ĝustaj. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Hans-Burkhard Dietterle, Edeltraut Henning (Germanio), Marianna Boharewicz, Dorota Burchardt, Stanisław Płachta, Zbigniew Tylkowski, Russ Williams (Pollando), Klara Ilutoviĉ, Svetlana Konjašova, Nikolao Neĉajev, Oleg Vasiljev, Vladimir Vyĉegjanin (Ruslando), Keneĉjo Goldbergo (Usono).

Loto donis la libropremion al **Nikolao Neĉajev**, kiu ricevas libropremion kaj niajn gratulojn.

La ĝustaj respondoj: *Maldekstren malsupren:* 1. Tro; 3. Aromo; 4. Froko; 5. Arogi; 6. Osako; 7. Etiko; 8. Brizo; 9. Plado; 10. Tiaro; 11. Senti; 12. Odo. *Dekstren malsupren:* 1. Broki; 2. Trogo; 3. Aroko; 4. Frako; 5. Asizo; 6. Otido; 7. Erari; 8. Blato; 9. Pindo; 10. Teo; 12. Omo.

Tri pigraj bankistoj

1. Pigra bankisto havas dek sakojn da sepgramaj oraj moneroj. Unu estas plena de falsaj moneroj, kiuj pezas je unu gramo malpli ol la veraj. Krome li havas precizan pesilon, sed li povas uzi ĝin nur unufoje. Kiumaniere la bankisto povas ekscii en kiu sako la moneroj estas falsaj?

2. Pigra bankisto havas 9 monerojn, unu el kiuj estas falsa kaj pezas iom malpli ol la aliaj. Krome, li havas lev-pesilon sen peziloj. Kiumaniere la bankisto povas trovi la falsan moneron uzante la pesilon nur dufoje.

3. Pigra bankisto trinkis kafon kaj hazarde verŝis kafon sur sian kalkulon kaj el ĉiuj ciferoj restis videbla nur unu – 1. Bonvolu helpi al la bankisto trovi ĉiujn ciferojn en la kalkulo. Ĉiu punkto sur la suba bildo signifas makulitan ciferon.

$$\begin{array}{r} \times \quad \cdot \cdot \\ \hline \cdot \cdot \cdot \\ \cdot \cdot \cdot \\ + \quad \cdot \cdot \cdot \\ \hline \cdot \cdot \cdot \cdot \cdot \end{array}$$

La solvoj devas veni al la redakcio antaŭ la 10a de decembro 2012.

Trovis kaj adaptis **Aleksej Korŝenkov**

Festo, la lasta antaŭ la mondfino? Kaj poste?



Eble kelkaj el vi embaras-iĝis, legante la titolon de la artikolo de Flo (p. 12) pri la aŭgusta Festo. Sed tiuj, kiuj aŭdis pri la prognozo de la antikvaj majoj, ja komprenas, ke ne trompas la vortoj sur la T-ĉemizo de Dmitri Horowitz, partoprenanto de la somera KEFeto en Kopenhago — ja la mondfino okazos la 21an de decembro 2012.

Sed la mondfino estas nur unu el la plej malgravaj organizaj problemoj. Festo okazos ankaŭ post la fino de la mondo. Venont-somere en Amikejo, Belgio. Jam nun notu ĝin en via postmondfina agendo.

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Nepreĵa EU, aŭ: Latrina doktrino

Esperanto Radikala Asocio <...> ĉiam konsideris Eŭropan Union kiel la supernacian estaĵon, kiu por propraj necesoj estas la ejo... (*ERA pli eŭropisma ol EEU* // HeKo 513 7-A, 21 aŭg 2012, esperantio.net/index.php?id=2003)

KCE remas surtere

La apuda salono Klara [de Kultura Centro Esperantista], kun la aneksaj kuirejoj kaj kameno, estos de nun uzataj precipe kiel remtero kaj kantino. (*Unua kahelo en la nova KCE-konferencejo* // HeKo 450 9-B, 22 aŭg 2010, esperantio.net/index.php?id=1424)

Senkompatate atakate

Antaŭ du jaroj Clive Boutle, kiu eldonis serion pri malpli uzataj lingvoj en Eŭropo, kontaktakis EAB-on [Esperanto-Asociacion de Britio]... (Intervjuo de Tim Owen kun Paul Gubbins, starinaniightsky.eu/eo/intervjuoj-kun-la-autoro/demando-respondo, stato 12 sep 2012)

Amikeca reto, aŭ: Kie situas Usono?

Mi loĝas en Usono, regiono de Usono konsiderata de kelkaj aliaj usonanoj kiel la plej norda regiono de Sudamiko. (Robb Kvasnak. *Usono*, 19 dec 2011, liberafolio.org/2011/sat-perdis-sian-prezidanton#1324321350; rimarkis Kalle Kniivilä)

Trotis anstataŭ galopi

Lastatempe, la librovendejo Borders banktrotiĝis pro diversaj kialoj, inter ili, tro malrapida akcepto de la bezonoj de interretaj eblecoj. (Steven Brewer, 9 aŭg 2011, liberafolio.org/2011/steven-brewer-uea-devas-eliri-el-sia-morta-spiralo#1312896853)

Muziku penoj niaj

Sistemo por demokrate elekti gvidistojn por koncertigi niajn penojn al komunumaj celoj... Sen unuigado ne estos nur ombro de kio ni povas esti se ni agu koncerte. (Penny Vos, 21 feb 2011, yahoo-grupo uea-membroj, mesaĝo 18198)

Gemelodio

Oj! mi forgesis: niaj gemeloj urboj estas Hirschberg (Germanio) kaj Ponsacco (Italio). (*Esperanto-Fervojisto* 2012, №1, p. 8.; rimarkis Ionel Oneŝ)

Inspira aspiro

Ankaŭ la ideo uzi nacian lingvon montras bonan komprenon de la fakto, ke Esperanto aspiras esti monvasta! (Peter Weide, 16 feb 2011, yahoo-grupo uea-membroj, mesaĝo 18174)

Mula matematiko, aŭ: Ĉu muloj aŭ muloj?

Ĉio ĉi implicas ke la postulo pri konstruado de moskeoj estas pravigebla: same kiel la mulsumanoj, mi opinias neakcepteble pagi por religio kiu ne koncernas min. (Annick Waflart. *Persona opinio pri konstruado de religiejo* // *Ateismo*, majo 2011, p. 14; rimarkis Russ Williams)

Plukis **István Ertl**



FESTO estis la plej brila muzika Esperanto-evento ĉi-jare, interalie, pro la furoraj koncertoj de *Dolĉamar* (supre; foto de Sjoerd Bosga) kaj Jonny M. (sube; foto de Flo).



Vjetnamio. Pro la subita rezigno de Japanio okazigi la 68an Internacian Junularan Kongreson, la Hanojaj organizantoj havis tre malmulte da tempo por pretigi la kongreson. Sed malgraŭ la tempopremo ili sukcesis kaj gaje festenis dum la kongresa bankedo en la restoracio *Sen*. (*Informada fako de TEJO*)



Ruslando. La 3an de septembro en la Moskva librovendejo-prelegejo *Ĉitalka* okazis elektronika prezentado de Esperanto, dediĉita al ties 125-a jubileo. La prezentadon ĉeestis pli ol 30-persona atentema kaj demandema publiko, veninta danke al publikaj ret-anoncejoj en Moskvo. (*Irina Gonĉarova*)



Pollando. La 14an de septembro en la muzeo de Staszów en ĉesto de urbaj aŭtoritatoj estis malfermita la ekspozicio “125 jaroj de Esperanto”, aranĝita de Andrzej Sochacki. Post lia rakonto pri Esperanto koncertis loka lernantino Wiktoria Pikul kun piana akompano de Kamil Kondek. (*Andrzej Sochacki*)

HISTORIO

DE ESPERANTO



Verkita de Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 5

Aleksander Korĵenkov. *Historio de Esperanto*
Serio *Scio*, Volumo 5
128 paĝoj, 12 eŭroj

Mi estas homo



Originalaj verkoj de
d-ro L.-L. Zamenhof

Serio *Scio*. Volumo 6

L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*
Serio *Scio*, Volumo 6
288 paĝoj, 24 eŭroj

HOMARANO

La vivo, verkoj kaj ideoj
de d-ro L.L. Zamenhof



Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 8

Aleksander Korĵenkov. *Homarano*
Serio *Scio*, Volumo 8
360 paĝoj, 27 eŭroj

Aleksander Korĵenkov



ZAMENHOFOLOGIO

Aktualaj problemoj kaj taskoj

Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*
Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5
16 paĝoj, 3 eŭroj

Mendu en via kutima libroservo